

Gazeto Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

14a Jarkolekto * JUNIO '97 * N-ro 50

50 numeroj





1-a epoko
1910-1912

Esperanto en Andaluzio
Universala Lingvo
en
Universalema Lando

2-a epoko
ekde 1984

GAZETO ANDALUZIA
FUNDADA POR D. JOSÉ GARZÓN RUIZ en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.
EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto. REDACCIÓN: Armengual de la Mota, 33, 4º D, 29007 Málaga. DIRECCIÓN POSTAL: Apartado 864, 29080 Málaga. DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. IMPRIME: COPICENTRO, Alameda Principal 42, MÁLAGA.
DIRECTOR: Andrés MARTÍN GONZÁLEZ.
REDACTORES: José Francisco MARTÍN DEL POZO (Apartado 5184, 29080 Málaga, delpozo@redestb.es), José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ (joser@lander.es).
COLABORADORES: Giordano MOYA, Luis SERRANO PÉREZ.
GRÁFICOS: Fondo informático de AEU.

50 numeroj, multaj personoj 3
Efika Esperantismo / 17 4
Kiu estas kiu 5
Lingva angulo:
Propono por solvo de la participa problemo 6
Komentoj pri la propono por solvo de la participa problemo 8
Praktikaj konsiloj pri Esperanta prononcado 11
Poezia angulo 12
Eŭropa esplorroboto komprenas Esperanton 17
Monata Babilado 18
Informado 20
Literatura Enciklopedio 20
Solvo de la vortenigmoj, n-ro 49 21
Konkurso "50 numeroj de Gazeto Andaluzia" 22
Mi kaj ri, kaj la sun' 23
Vortenigmo 25

(...)

50 Numeroj - multaj personoj

La laboro dum 14 jaroj rimarkiĝas en la 50 numeroj de la revuo kiun Vi havas enmane. Sed ne temas pri laboro de sennomaj personoj, kontraŭe multaj el ili estas tre bone konataj en esperantistaj medioj, aliaj ne, tamen ilia laboro meritas elstarigon. Kelkaj el ili verkis altkvalitajn artikolojn, aliaj estis intervjuataj, aliaj sendis leteron poste publikigitan, kelkaj kunlaboris en la presado, eldonado aŭ sendado de la revuo. Ĉiuj ili, kaj ni esperas forgesi neniun, meritas mencion en niaj paĝoj. Multajn Dankojn, Geamikoj!

Ricardo Felipe ALBERT REYNA
Antonio ALONSO NÚÑEZ
Imre BAJAKI
Donald BROADRIBB
Josep CASES I POU
Paqui CORRALES GUERRERO
Alfonso ESCAMILLA ROA
Alain FAGOT
Miguel FERNÁNDEZ
Gian Carlo FIGHIERA
Elisabetta kaj Aldo FORMAGGIO
Alberto FRANCO RAMÍREZ
David GALADÍ ENRÍQUEZ
Luis GILPÉREZ FRAILE
Antonio GONZÁLEZ ÁLVAREZ
Pedro José GOSÁLVEZ OLMO
Miguel GUTIÉRREZ ADÚRIZ
Julio HERRERO SEGURA
Manuel LÓPEZ HERNÁNDEZ
Andrés MARTÍN GONZÁLEZ
José Francisco MARTÍN DEL POZO
Juan de Dios MONTOTO DE SARRIÁ
César MOSTEYRÍN
Giordano MOYA
Juan NAVAREÑO
Francisco José NIEVES PAVÓN
Luis OJER
Rafael PLEGUEZUELOS GONZÁLEZ
Manuel RAMÍREZ CEPEDA
Vicente RAMÍREZ PARRAGA
Francisco ROBLES
Hugo RODRÍGUEZ
Antonio RODRÍGUEZ GASCH
José Mª RODRÍGUEZ-HERNÁNDEZ
Rafael RUIZ CRIADO
Lina RUIZ OLIVARES
Guadalupe SANZ
Rafael SEPÚLVEDA
Luis SERRANO PÉREZ
Stanislaw STASZEWSKI
László SZILVASI
José Antonio VALVERDE MARTÍN
Eduardo VARGAS "SOLO"

LA REDAKCIO DE *GAZETO ANDALUZIA*

Efika Esperantismo / 17

Ni jam diris, ke estas necesa la ŝanĝo de la ordinara pensmaniero. La ordinara pensmaniero rilatas la pasintecon, sed la pasinteco jam estas forpasinta. Revi pri reveno al la pasinteco, kiel revas la etnaj naciismoj povas nur konduki al pasintaj tempoj, kiuj precipe estis plenigitaj de militoj, ekonomiaj krizoj kaj socialaj konfliktoj. Kion ni devas impulsi estas la forĝado de la estonteco, kaj tiu ne devas esti nura hazarda disvolviĝo, sed racia kaj humana kreaĵo de la homa intelekto kaj volo.

Kion hodiaŭ ni vidas estas la materiala planediĝo. Nek por la aviado, nek por interreto, nek por la financaj kapitaloj ekzistas nuntempe landlimoj.

Laŭ la suprenirado de la civilizacio, estas klare perceptebla, ke la homaro devas evolui al pli humana socio en planeda vasteco. Devas malaperi la ŝtataj landlimoj kaj aliaj baroj, kiuj disigas la homojn kaj baras la interkompreniĝon. En tio devas roli la lingvo Esperanto.

Tiu evoluo al la humana homarunuiĝo ne alvenos hazarde laŭ la propra irado de la okazaĵoj. Eble povos alveni unuiĝon fare de centro de povo, kiel granda imperio. La nuntempa materiala planediĝo permesas la fondadon de granda imperio, surbaze de ekonomia hegemonio, kio estos truda unuigo de la homaro sub unu reganta povo.

Libera unuiĝo nur povas alveni per propra volo de ĉiuj personoj, konsciantaj, ke libera unuiĝo estas nepre necesa fronte la jam materialan unuiĝon.

La nova pensmaniero devas esti superkulturo simila al la scienco. La scienco estas planeda. Ne ekzistas naciaj sciencoj nek klasaj sciencoj, la scienco estas komuna por ĉiuj, ĝi estas akiraĵo de la civilizacio.

Tiu pensmaniero estas entenata en la Interna Ideo de Esperanto, sed ĝi ankoraŭ montriĝas kiel idealismo el romantikisma deveno. Idealismo ne estas deviga. La neceso de homarunuiĝo faras, ke tiu nedeviga idealismo fariĝu deviga moralo por realigi tion, ĉar la afero jam delasis esti idealismo, estas necesa alpaŝo en la civilizacion. Aŭ la homoj konstruos novan civilizacion aŭ la homaro riskas eĉ

(Daŭrigo sur la paĝo 10)



Kiu estas kiu?

De tempo al tempo aperas en neesperantistaj gazetoj artikoloj de pensuloj kiuj, kvazaŭ savantoj, atentigas la legantaron pri la urĝeco trovi efikan solvon al la lingva problemo je internacia nivelo. Ankaŭ de tempo al tempo, iu rondo de intelektuloj subskribas manifeston per kiu ili postulas ke oni akceptu siajn tiurelatajn proponojn.

La lingva problemo havas flankon socialan kaj politikan kaj, kiel sciate, pri politikaj kaj religiaj aferoj ĉiu homo sentas sin posedanto de la vero kaj tre ofte opinias, ke nur li trafas la solvon. Ja, ĉiu persono rajtas partopreni en ĉispeca debato, ĉar la problemo estas ĉiutage de li travivata. Tamen, ankaŭ certas, ke kiel la malsanulo konscianta sian malsanon aliras al kuracisto serĉante taŭgan rimedon, tiel ĉiu ulo konscianta la mondan babelon devas aliri al la respondo fakulo serĉante la plej taŭgan kaj efikan rimedon. Bedaŭre tamen, oni konstatas, ke je abstrakta nivelo ĉiu persono akceptas tion (kvankam ne tute), sed je praktika nivelo, ĝenerale, oni akceptas la proponon plej kongruan kun la interesoj de la ekonomiaj kaj politikaj potencoj. Tia estas, ekzemple, la sinteno de la *Comité européen pour le respecte des cultures et des langues en Europe* (Eŭropa Komitato por la respekto de la kulturoj kaj la lingvoj en Eŭropo).

La 17an de ĉijara marto, la franca ĵurnalo *Le Monde* aperigis manifeston de tiu Komitato titolitan *Pour une Europe humaniste, plurilingue et riche de sa diversité culturelle* (por humanisma Eŭropo, plurlingva kaj riĉa je kultura diverseco). En tiu alvoko lerte oni miksas la veron kaj rifuzindaĵon.

Vero: Eŭropo unuiĝas iom post iom, plureco identigas Eŭropon, la lingvo kunportas kaj strukturas la pensadon, la regado de ununura lingvo malriĉigas la kulturon, neniu lingvo estu privilegiata en Eŭropa Unio, ankoraŭ ne estas Internacia Juro de la Lingvo.

Malakceptindaĵoj: oni uzu du tri lingvojn en teknikaj kunvenoj; la junularo lernu du tri eksterlandajn lingvojn.

Mi tute rifuzas la proponon uzi du

(Daŭrigo sur la paĝo 10)



Lingva angulo

Al nia poŝtkesto alvenis artikolo kiu denove traktas la -ita/-ata problemo; ne la unua Juan Navareño elpensis sufikson kiel solvon al la duba afero. Lia artikolo pensigis nian redaktoron... legu la respondan artikolon tuj post jena...

Propono por solvo de la participa problemo

La verba konjugacio estas mirinda kreaĵo de Zamenhof kaj permesas per simplaj rimedoj nuanci la tempojn de la esperantaj verboj ekde la antaŭpasinto ĝis la postfuturo sen iu ajn problemo nek escepto.

La pasivigo de la frazoj estas ankaŭ tre facila. **Mi fermis la pordon** estas pasive **La pordo estas fermita de mi**, kies signifo estas ekzakte la sama, kaj estas uzata ekde Zamenhof ĝis hodiaŭ, tute laŭ la 6a regulo de la *Fundamento*, kiu temas nur pri la verboj.

Bedaŭrinde, oni uzas la finaĵon **-ita** ankaŭ por montri nunan rezulton, forgesante ke **-it-**, laŭ la 6a regulo, signifas *estinta tempo*, ĉu estu uzata kun verba, adjektiva aŭ adverba senco, kaj ke la adjektiva uzo de **-ita** montras *pasintan rezulton* kiu povas daŭri aŭ ŝanĝi dum la tempo kiu pasis ekde la fino de la ago ĝis nun. Tial, la uzo de **-ita** por montri nunan rezulton nur povas esti tolerebla kiam estas uzata kun verboj kies rezulto ne povas ŝanĝi, kiel **skribi, rompi, mortigi**, ktp., sed ne kun verboj kies rezulto povas ŝanĝi, kiel **fermi-malfermi, varmigi-malvarmigi, ŝalti-malŝalti** kaj ĝenerale ĉiuj kiuj havas aŭ povas havi la prefikson **mal-**, kaj tiuj kiel **konstrui, detrui, rekonstrui**, ktp., kies rezulto povas esti ŝanĝita per posta ago.

Feliĉe, esperanto havas multajn rimedojn ne esploritajn, kiel la sufikso **-ad-**, kies signifo estas daŭro kaj kun la adjektiva finaĵo **-a** povas formi verbajn adjektivojn, kiuj ne havas tempon, ĝuste kion ni bezonas.

Tia uzo estas ege simpla, kaj tute konforma kun la *Fundamento*, ĉar nur bezonas uzi **-ada** por montri rezulton, kaj uzi **-ita** por montri agon.

Jen ekzemploj: **La pordo estas fermita** (pasinta ago). **La pordo estas fermada** (nuna rezulto). **La pordo estis fermita** (antaŭpasinta ago). **La pordo estis fermada** (pasinta rezulto). **La kafo estas varmigita** (pasinta ago). **La kafo estas varmada** (nuna rezulto). **Vundita** (kiu ricevis vundon). **Vundada** (kiu havas vundon -rezulto). **Kiam mi alvenis, la fiŝo estis manĝita** (antaŭpasinta ago). **Kiam mi alvenis, la fiŝo estis manĝada** (pasinta rezulto). La sufiksojn **-iĝ-** kaj **-ig-**, pro tio ke ili ne montras rezulton, oni ne povas uzi. **Varmigita** kaj **varmiĝita** havas la saman rezulton: **varmada**.

La pasivaj participoj **-ita**, **-ata** kaj **-ota** estas ĉiam pasivaj verboj kun tempoj estinta, estanta kaj estonta,

kaj la finaĵo **-ada** ne havas tempon kaj estas verba adjektivo kiu povas esti uzata kiel la aliaj adjektivoj.
La problemo, do, ne estis en la participo, sed en ĝia misuzo.
Pro tio, ke la nuna rezulto de **varmigita** aŭ de **varmiĝita** estas la sama, **varmada**, ni povas ne uzi la sufiksojn **-ig-** aŭ **-iĝ-**, kiuj estas superfluaj.
La pasivigo de **Mi fermis la pordon** kiel **La pordo estis fermita de mi** (itista skolo) estas mallogika kaj kontraŭfundamenta, ĉar la tempo de **-ita** estas antaŭa al tiu de la helpverbo **estis**, kiu jam estas antaŭa al la nuna tempo. Tio faras, ke la rezulto estu antaŭpasinto.
Pri la verbeco de la participoj sufiĉas vidi ke Zamenhof metis ilin en la 6a regulo kiu temas nur pri la verboj kaj ne en la 4a, kiu temas pri la adjektivoj kaj ankaŭ ne faris apartan regulon, kiel la 5a por la numeraloj, kiuj estas specialaj adjektivoj.
Pri la tempoj, li skribis *tempo estanta, tempo estinta kaj tempo estonta,* kaj ripetis du fojojn plu *estanta, estinta kaj estonta.* Ĉu tio ne sufiĉas?
Kelkaj konfuzas gramatikan tempon en kiu prezenco estas ago ĉiama aŭ ne finita, pasinto estas ago kiu jam finis kaj futuro estas ago kiu ankoraŭ ne komencis, kaj filozofia tempo en kiu la prezenco ne ekzistas, estas nur unu punkto sen daŭro kiu moviĝas de la pasinto al la futuro. Tiu tempo estas uzata kiel gramatika tempo en orientaj lingvoj, kiel la araba kiu havas nur du tempojn, perfektan (finitan) kaj imperfekton (ne finitan).
Esperanto uzas ambaŭ gramatikajn tempojn, kaj tio ne apartenas al la alta filozofio, sed al la ĉiutaga vivo. Eĉ neklerulo diras **Mi ferias 30 tagojn jare, mi feriis 12, do miferios 18**. La prezenco **30 tagoj** estas egala al la pasinto **12** plus la futuro **18**.
La pasivigo de **Mi fermis la pordon** kiel **La pordo estis fermata de mi** (atistoj), montras per **-ata** ke la ago ne finiĝis en la pasinta tempo montrita de la helpverbo **estis**, tial la rezulta tempo estas imperfekta preterito, malgraŭ tio, ke la tempo estas la sama.
La rezulto aperis dum la ago kaj ne post la ago. En **lumigata ĉambro** estas rezulto (oni vidas), sed en **lumigita ĉambro** ne estas rezulto (oni ne vidas); en **rompita botelo** kiam finis la ago estas rezulto kiu daŭras ĉiam, kaj en **fermita pordo** la rezulto povas daŭri aŭ ne daŭri. Tial la rezulto ne dependas de la finaĵo de **-ata** aŭ **-ita** de la participo, kaj tial **-ada** kiu ne havas tempon povas esti taŭga solvo.
Mi esperas ke ĉi tiu solvo estos akceptita de ambaŭ skoloj kaj finos la hontindan problemon, por la bono de ĉiuj.

JUAN NAVAREÑO

Komentoj...

pri la propono por solvo por la participa problemo de J. Navareño

Unue, ni konsciu pri la malsamaj interpretoj kiujn la pasivaj participoj havis kaj ankoraŭ havas en Esperantio. Interesiĝantoj povas konsulti tiurilatan bibliografion sub la fino de ĉi tiu artikolo.

Iuj opinias, ke **–ata/–ita** montras aspekton (**–ata**, daŭran aspekton; **–ita**, perfektan; t.e., se oni uzas **–ata**, temas pri ago kiu daŭras, dum la uzo de **–ita** montras rezulton de tiu ago).

Aliaj opinias, ke **–ata** montras samtempan agon, dum **–ita**, antaŭtempecon. T.e., ili ne akceptas aspektojn (almenaŭ, ne aspektojn montritajn per participaj finaĵoj).

Nu, la **–ita/–ata** bataloj longe furoris en Esperantio. Post trastudi la uzon de Zamenhof (ne nur la *Fundamentan Gramatikon*, ĉar ties priskriboj estas mallongaj kaj mankohavaj), la Akademio apogas la itistan interpreton. Dume, atistoj (inter ili, la Analiza Skolo) malkonsentas.


Iuj voĉoj, inter ili tiu de samideano Navareño, proponis la uzadon de aliaj sufiksoj kiuj precizigus la aferon. Plej grava problemo por la nova propono estas, ke la sufikso **–ad–** apogita de Navareño jam estas ĉiutage uzata en Esperantio kun signifo malsama ol tiu de li proponita. **La pordo estas fermada** signifas **La pordo estas rilata al fermado, t.e., al la ago fermi**. Ekzistas do konflikto inter la tradicia eĉ se malofte uzata signifo, kaj tiu, kiun **–ada** akirus laŭ la Navareña propono. Kompreneble, mi malkonsentas kun li pri tio, ke "tia uzo estas tute konforma kun la *Fundamento*".

[Tiurilate malsamas la propono de Teruo Mikami, pro tio ke la sufikso **–aŭta** ne ekzistas. Tamen, post preskaŭ 40 jaroj ĝi restas ankoraŭ nur propono.]

Jen kelkaj aliaj komentoj, iom pelmele redaktitaj:

❶ La participoj estas, kiel en ĉiuj lingvoj, kaj verbaj kaj adjektivaj; ili estas verbaj pro tio ke ili povas akiri verbajn komplementojn; kaj ili estas adjektivaj, ĉar ili finiĝas per adjektivaj finaĵoj **–a(j)(n)**.

❷ Oni multe parolas pri *antaŭpasinto* aŭ *pluskvamperfekto* (kial ne *plusolperfekto?*) kaj *postfuturo*. Oni bonvolu kom-



preni ke en Esperanto ne ekzistas t.n. kompleksaj tempoj. Tempoj ekzistas tri, **-as, -is, -os**. Paroli pri antaŭpasinto konvenas, se ni parolas pri tempaj rilatoj, sed ne pri verba morfologio. Se ni akceptas tian uzon, temas pri analizo de Esperanto per konceptoj apartenantaj al aliaj lingvoj (same, kiel analizo de la hispana lingvo per konceptoj kiel dativo, genitivo propraj de la latina, kiuj tamen ne ekzistas en la hispana).

❸ Kelkaj parolis pri la risko de disdialektaliĝo kiun Esperanto suferas pro la malakordoj i.a. de itistoj kaj atistoj. Ne timu, memoru, ke ne ĉiuj hispanparolantoj mastras ĉiujn tempojn de nia lingvo, kaj ne pro tio ili estas dialektoparolantoj. Ekz., multaj (eĉ personoj ne apartenantaj al t.n. dialektaj provincoj) ne scias distingi inter **vendría** kaj **habría venido**, aŭ inter **vine** kaj **he venido**. Se inter hispanlingvanoj ekzistas kulturaj malsimiloj rilate la lingvouzo, kaj tio ne implicas dia-lektiĝo (ĉar samaj malsimiloj ekzistas samtempe kaj en la hispana lingvo kaj en ties dialektoj), same okazas inter Esperantoparolantoj.

❹ Kiom ofte vere uziĝas pasivo? Oni povas paroli perfektan Esperanton sen ĝi! Ekzemple, se oni anstataŭe uzas aktivon kun **oni** aŭ tre ofte, la sufikson **-iĝ-**. **(La pordo fermiĝis, oni fermis la pordon**...).

❺ Oni ellernu Esperanton se oni volas proponi novajn metodojn. Ekz., ne ekzistas vortoj kiel **varmiĝita** simple, ĉar verboj kun **-iĝ-** povas havi nek rektan komplementon en la aktiva nek, pro tio mem, pasivan uzon.

Prefere ni Esperantistoj ne tiom teoriumu pri eta ero de nia gramatiko, ne fendu harojn pri ĝi, kaj uzu aliajn eblecojn, jam delonge tradiciajn en Esperantio. Tiel, perlingve, rezultos pli granda riĉigo por Esperanto ol tiu akirita per tiom da prilingvaj diskutoj.

JOSÉ F. MARTÍN

BIBLIOGRAFIO

DD.AA., *La Zamenhofa Esperanto: Simpozio pri -ata / -ita*, La Laguna, 1961.

KALOCSAY, K., *Vojaĝo inter la tempoj*, La Laguna, 1966.

MATTOS, G., "Lingvistika priskribo de la verbo en Esperanto" en *Serta Gratulatoria in honorem Juan Régulo II*, La Laguna, 1987.

MIMÓ, L. *Kompleta Lernolibro de Regula Esperanto (Analiza Skolo)*, Sabadell 1973.

WARINGHIEN, G. kaj KALOCSAY, K., *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto*, Rotterdam 1985 (kvina eldono)

WENNERGREN, B. *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*. Interrete, 1997 (sesa eldono).

(Daŭrigo de la paĝo 5)

tri lingvojn en teknikaj kunvenoj, ĉar en Eŭropa Unio neniu persono rajtas altrudi sian lingvon al alia. Cetere, kial la junularo devos studi ĝuste du tri lingvojn? Kiujn lingvojn? Pro kio tiujn lingvojn anstataŭ aliaj?

Laŭ mia kompreno, oni devas senrajtigi tiujn «gravulojn» kiam ili preterpasas la centjaran ekziston kaj funkciadon de nia internacia lingvo. Al tiuj uloj, mian malestimon. Mi preferas la solvon havigitan de la Radikala Partio: Esperanto, kiel *federacia* lingvo por Eŭropo (se Eŭropo unuiĝos reale, tio okazos federacie).

Alvenos la tago en kiu iu «gravulo» alprenos la defendon de sennacia lingvo kiel ununura solvo al la internacia babelo, kaj tute certe aperos uloj kiuj montros sin kiel la veraj iniciatintoj de la solvo. Ili pretas kaj pretos akcepti ĉion escepte de la rekono de la centjara penado de la esperantistaro. Tamen, esperantismo denaske defendas la plurecon kaj egalecon de kulturoj (ne nur en Eŭropo, sed en la tuta mondo) kaj, nuntempe, la kultura identeco de Eŭropo defendeblas lingve nur per Esperanto.

ANDRÉS MARTÍN

(Daŭrigo de la paĝo 4)

sian malaperon. La nuna historia tempo per si mem tiel same povas alporti grandan progreson aŭ ankaŭ grandajn riskojn de profundaj krizoj.

La scienco estas teorio, sed el la scienco devenas la tekniko, kiu estas la praktika parto de la scienco.

Nia Interna Ideo estas kiel la scienco, teorio. El la Interna Ideo ankaŭ devas eliri ĝia praktika flanko, la realigo de la homarunuiĝo. En tiu praktika parto ni alportas la superinternacian lingvon Esperanto, sed krome ankaŭ ni devas klare koncepti la homarunuiĝon en libereco kaj solidareco, en komuna etoso de kunvivado. Estas la enkonduko en la praktiko de la teorio aŭ ideo. Unuiĝintaj Nacioj estas komenco. La Eŭropa Unuiĝo estas provo en nur unu kontinento. Ni devas koncepti la homarunuiĝon mondskale.

La esperantista movado, unika en la mondo, kiu celas la homarunuiĝon, alportas la supernacian lingvon kiel praktikan ilon de interkompreniĝo. Ĝi devas levi la standardon de la homarunuiĝo kaj alvoki ĉiujn homojn por tiel alta agado, la homarunuiĝo en pli altgrada civilizacio.

GIORDANO MOYA

Praktikaj konsiloj pri Esperanta Prononcado


Mi prezentas ĉi tiun temon kiel kontribuon al plibonigo de la lingvoregado ĉe andaluzaj esperantistoj. Kiam oni regas la ceterajn nivelojn de lingvo, mismastrado de la sonsistemo povas ruinigi ĉiun provon interkompreniĝi parole.

Ne ekzistas tute unueca prononcado de Esperanto. Tamen oni povas konsili, por ke ĝi estu almenaŭ tiel unueca, ke ĝi ne nasku miskomprenojn. Se necese, ĉe plej grandaj diferencoj inter kunparolantoj, oni parolu lante. Pri tono ĝenerale mi diru nur, ke ĝi povas esti des malpli komprenebla, se tro malplata. Ĉiu sono estu klare prononcata, ĉu konsonanto, ĉu vokalo, per konstanta, propra artikulacio (e.e. dispozicio de la voĉaj organoj).

Antaŭ ol tuŝi ĉiun sonon, similojn kaj diferencojn, oni konsciu kaj rekonu plej gravajn voĉorganojn kaj ĉi ties soninfluajn movojn. La nomon de ĉiu zono aŭ parto vidu en la bildo. La movojn ni traktos kun ĉiu litero aŭ litergrupo.

P,T kaj K prezentas nenian malfacilon por ni. Iliaj voĉaj respondaj sonoj B,D kaj G, tute male, postulas grandan atenton pri siaj artikulacioj. La unua diferenco inter ambaŭ serioj estas jena: ĉe la unua, la voĉkordoj ne vibras; ĉe la dua, jes. Eblas rimarki tian vibradon tuŝante ĉe la adampomo, kaj ankaŭ kovrante forte la orelojn: oni tiam aŭdas zumon kvazaŭ abelon se oni prononcas voĉan sonon.

Sekve, ĉiuj aliaj movoj estas komunaj respektive al P-B, T-D, K-G. Tio estas, por prononci B oni devas tute kuntuŝi la lipojn, ĉiam kiel ĉe la dua B de la



1 Lipoj
2 Dentoj
3 Gingivo
4 Palato
5 Velo
6 Uvulo
7 Faringo
8 Laringo
9 Voĉkordoj
10 Lango

(Daŭrigo sur la paĝo 14)

Poezia Angulo

Ho, estas vi, estas vi, eterna nomo sen dato,
brava batal' de l' mar' kontraŭ soifo,
klifo tuta el akvo, kiu minacas fali
sur mian glatan formon, lamenon sen memoro.

Estas vi, ombro de la mar' potenca,
genia rankoro verda, kie ĉiuj birdoj similas al ŝtonoj senaeraj
deprimiteco aŭ afliktiĝo, kiu minacas mian vivon
kiel amo finiĝanta per la morto.

Buĉu min, se vi volas, pluma maro senkompata,
gut' enorma entenanta la teron,
fajro, kiu detruas mian vivon senvervan
ĉi tie sur la plaĝo, kie la lumo rampas.

Buĉu min kvaz' ponardo, ora sun' aŭ luma,
kvaz' rigardo akra el okulo nevundebla,
kvaz' potenca brako, kies nudeco fridus,
kvaz' ekfulm' serĉunta mian bruston aŭ destinon...

Ha, baldaŭ, baldaŭ! Mi volas morti ĉe vi, mar',
ĉe vi, maro vertikala, kies ŝaŭmo tuŝas firmamenton,
ĉe vi, kies ĉielaj fiŝoj inter nuboj
similas birdojn forgesitajn en la fundo!

Venu al mi viaj ŝaŭmoj bordo-lekaj, kristalecaj,
venu al mi viaj brakoj verdaj disfalantaj,
venu l'asfiksio, kiam la korpo kontrahiĝas
mergita sub la lipoj nigraj, kiuj sin renversas.

Viola sunо brilu super la unuforma morto.
Totala morto venu sur la plaĝon, kiun mi subtenas,
sur ĉi ĉi-mondan plaĝon, pezan al mi en la brusto,
tra kie ŝajnas forkuri piedoj tre leĝeraj.

Mi volas la rozan koloron aŭ la vivon,
mi volas la ruĝan aŭ ties krian flavon,
mi volas la tunelon, kie la kolor' solviĝas
en la perfidan nigron, per kiu Morto ridas ĉe la buŝo

Mi volas kisi la eburon de la antaŭlasta muto,
kiam la mar' sinpele retiriĝas,
kiam sur la sablo restas nure konkoj
kaj fridaj skvamoj de fiŝoj sin amantaj.

Morto kiel plenmano sabla,
kiel akvo, kiu en la kavo restas sola,
kiel mevo, kiu en la mezo de la nokto
havas sang-koloron super maro neekzista.



Vicente ALEIXANDRE
Sevilo 1900 - Madrido 1984
Nobel-premiito en 1977

(Tradukis Fernando DE DIEGO en sia verko *Sentempa Simfonio*)

(Daŭrigo de la paĝo 11)

hispana vorto "bomba", ankaŭ se ĝi troviĝas inter du vokaloj, ekzemple "nubo" (ĝi sonu preskaŭ "nupo"; la diferenco: voĉkorda vibro).

Same pri D: la lango tute tuŝu la dentojn, kiel en hispana "anda". Kaj G estas prononcenda, kiel K, per intertuŝiĝo de la velo kaj la langodorso, ekzemple "lango".

Kiam mi parolas pri tuŝo ĉe ĉiuj tri sonoj, temas pri absoluta halto, momenta baro de aerfluo. Eventuale povas helpi la konsidero, ke sola diferenco inter B kaj M, kaj D kaj N, estas jena; ĉe M kaj N iom da aero trairas la nazan kavon.

Se ni elparolas B,D,G per rotado kaj senhalta glitado de aerfluo vic' al momenta baro, ekzistas risko de konfuzo kun V.Ŭ, Z, H-Ĥ. Por eviti tion oni ne nur atentu la unuajn sed ankau ĉi lastajn:

V: Artikulaciu ĝin kiel F kaj vibrigu la voĉkordojn. Atentu la lipojn; ne fermu ilin kiel por B.

Ŭ: Eblas prononci ĝin kiel tre mallongan U, neniam memstaran. Preskaŭ B, sed la lipoj neniam kuntuŝiĝas.

Z: Se oni ne misprononcas D, verŝajne ne okazos konfuzo. Tamen atentu Z ne estas DS. Ĝia plej proksima najbaro estas simpla S. Diferenco jenas: ĉe S ne vibras la voĉkordoj; ĉe Z, jes. Ambaŭkaze la aero fluas senhalte, sen eĉ ioma halteto, kvazaŭ serpenta silbado. La diferenco inter S kaj Z estas tute paralela al tiu inter F kaj Z.

Fine, misprononcata G estas konfuzebla kun misprononcata H kaj Ĥ. Ĉi du lastajn mi ne pritraktos. Espereble sufiĉos diri ke H estas kiel hispanlingva J prononcata de plej multaj andaluzoj, dum Ĥ estas ties ofte kastilia varianto, pli simila al K, kiun ni povas ofte teleaŭdi.

Ambaŭ espereble, sufiĉos nur atento por ne prononci S kiel H; ekzemple: "mi parolas"; ne "mi parolah" nek "mi parola"; "Esperanto" ne "Ehperanto".

Por reveni al S/Z, jen plia trajto: la langofroto okazas jen kontraŭ la dentoj, jen kontraŭ la gingivo. Mi konsilas la unuan eblon por eviti eventualan konfuzon kun Ŝ, Ĵ.

Same tial mi preferas jenon pri ĉi lastaj: Ili prononciĝu per samtipa frotado de la langodorso kontraŭ la palato. Ŝ estas preskaŭ identa kun la andaluzia CH (ne kastilia!); la aerfluo ne ĉesas kuri eĉ momenton. Ĵ estas ĝia voĉa najbara sono, fakte preskaŭ sama kun la argentinaj LL kaj Y. Eventuale, la palaton tuŝu la langopinto anstataŭ la langodorso.

Apud la pli-malpli sible frotaj sonoj S,Z,Ŝ,Ĵ ekzistas



eksplodaj frotaj najbaroj: C,DZ,Ĉ,Ĝ. Mi inkluzivas DZ ĉi tie iom pro simetriemo, iom ĉar ties prononco en tiu kadro ne tro diversiĝas de la tute prava kaj defendinda D+Z. Sola diferenco inter la membroj de ambaŭ serioj povas esti, ke la duaj komenciĝas ĉiam per krakteto de la lango kontraŭ la tuŝataj voĉaj organoj, ankaŭ inter vokaloj; ekzemple "kaĉo"= "kaŝo" = "kaso" = "kaco"; "aĝo" = aĵo"; ktp. Ĉi tiu sona subsistemo estas jene bildigebla:

Lango tuŝas → / Kiel ↓	Dentojn aŭ gingivojn	Palaton
Frote (kun voĉkorda vibrado)	Z	Ĵ
Frote (sen voĉkorda vibrado)	S	Ŝ
Krake-Frote (kun voĉkorda vibrado)	(DZ)	Ĝ
Krake-Frote (sen voĉkorda vibrado)	C	Ĉ

Plia konfuzo eblas: tiu de Ĵ aŭ Ĝ kun J. Ĝi estas evitebla se oni prononcas J ĉiam kiel tre mallongan I. Tiel, "kajo" preskaŭ kiel "kai o". Por kazoj kiel "mielo" / "mjelo" mi konsilas mallongan paŭzon post ĉiu vokalo, kvazaŭ estus buŝa malhelpaĵo: "mi-e-lo"; dum "mjelo" konsistus el nur du silaboj ("mielo" el tri), tio estas, tre rapida "mje" (kun nenia paŭzo inter "j" kaj "e") plus "lo". Oni apliku tian regulon al "biblioteko" kaj aliaj vortoj forme similaj al hispanaj, kiuj tamen ne misgvidu nian prononcon. Ĉiam prononcu ĉiun vokalon en tute aparta silabo.

Se oni forgesas prononci fidele al la skribo, "tian" povas fariĝi "tiam" kaj tutaj frazoj miskompreniĝi. Ekzemple komparo "mi ne ŝatas tian buŝon" kun "mi ne ŝatas tiam buŝon"; aŭ "cerbumi" kun "servumi". (Cetere ĵus ekcirkulis jena amare preskaŭ vera ŝerco: "andaluzoj servumas, ne cerbumas".)

Nur atento kaj praktiko povas asimiligi, ke KV ne estas KŬ, kaj ke nenia vokalo troviĝas inter K kaj V. Tiel do, "kvar", ne "kŭar", nek "kevar", nek "ekvar". Same pri KN, kiel "knabo", "knari", "knedi", k.s.

Ambaŭ sonas, kaj nur ili.

Ankaŭ la renkonto de S aŭ Ŝ plus konsonanto prezentas malfacilojn. Precipe oni evitu antaŭmeti vokalon "e" kaj prononcon H de tiuj du konsonantoj. Praktiko kaj ripeto, jen la sekreto!

Laste, ni ne forgesu R. Uzu laŭeble konstantan prononcon, konsilinde duonmildan. Prefere ĝi ne tro similu al L. Se necese, oni troigu la vibradon.

* * * * * *

La praktikan flankon mi pritraktos tre koncize. Plej konvene estus paroli kun personoj kun plej diversaj denaskaj lingvoj. Eventŭala taŭga surogato povas esti aŭskultado de kasedoj, sondiskoj kaj radiaj elsendoj. Malpli efikaj konsiloj, tamen sekvindaj estas: Voĉlegu, tiel laŭte kiel necese, ne forgesante literojn. Lernu tekstojn (ekzemple poemojn) parkere. Se eble, surbendigu kaj reaŭdu vian voĉon. Ĉiam, komparu la movojn de viaj voĉorganojn kun tiuj priskribitaj ĉi tie.

Se Esperanto ŝajnas pli facila por hispanlingvanoj ol por aliaj popoloj, tio estas ĉar ni forgesas pri klara, internacie komprenebla prononco. Ni praktiku ĝin do.

RIKARDO F.A.R.

Nul kaj Lacul



–Mi vizitis la kunvenon por aktivuloj!

–Sed kiel vi do aktivas? –Mi ja daŭre faras planojn kaj proponojn!

Eŭropa esplorroboto komprenas Esperanton

EuroSeek, la eŭropa alternativo al la usonaj esplorrobotoj *Altavista, Lycos* kaj *Yahoo!* celas fariĝi unu el la gvidaj internaciaj robotoj por la esplorado de la interreto. Tion ili provas atingi donante al la uzantoj la eblecon mem elekti la lingvon uzata por la esploro, kaj ne esti devigata uzi la anglan. Oni povas jam nun elekti inter 40 malsamaj lingvoj, de la bretona ĝis la turka. Nun ankaŭ Esperanto estas inter ili.

En Esperanto oni indikas la preferojn de sia esploro, indikante la vorton, nomon aŭ frazeron, kiun la roboto trovu. Sed eblas ankaŭ precizigi, ke la roboto trovu nur dosierojn en specifa lingvo aŭ lando. En tio *EuroSeek* estas por nun unika. En Esperanto aperas poste la raporto pri tio, kio estis trovita. Sed ankaŭ la ceteraj partoj estas esperantigitaj, ekzemple la tekstoj, kiuj klarigas la funkciadon, kaj aliaj.

Sed ne ĉio estas en Esperanto. Aperas sur la diversaj paĝoj anglalingvaj anoncoj kaj tekstoj, kiuj estas komunaj por multaj lingvovarioj.

Se oni indikis, ke *EuroSeek* trovu dosieron en Esperanto, oni konsciu, ke ĝi nur raportos pri dosieroj, kiuj havas informon pri lingvo en sia "kapo", t.e., ke ili komenciĝas per <HTML lang="eo">. Dosieroj sen tia indiko estas por ĝi lingve anonimaj.

EuroSeek indeksis ĝis nun la enhavon de 8 milionoj da ttt-dosieroj, sed atingos dum la venontaj monatoj 30 milionojn, kio igos ĝin minimume same ampleksa kiel Altavista. Nur post tiu ampleksigo la raportado pri Esperantaj dosieroj estos fidinda. Pli frue tiu informo ne estis registrita.

Oni ne bezonas loĝi en Eŭropo por uzi *EuroSeek*. Ĝi estas atingebla de kie ajn je la adreso <http://euroseek.net>.

FRANKO LUIN
<FRANKO@ESPERANTO.SE>
POR *INTERREDAKTORE*

Por niaj malpli teknikemaj legantoj: **(ESPLOR)ROBOTO**: komputilo kiu aŭtomate vizitas ĉiujn ttt-paĝojn de la interreto por akiri informojn pri iliaj adresoj kaj enteno. Poste, interretnavigantoj povas viziti tiujn robotojn kaj peti ilin trovi paĝon, kies adreson oni ne konas. Ekzemple, vi serĉas la tttejon de AEU; vi demandas pri Andaluzio kaj Esperanto, kaj vi ricevos la informon: **AEU, http://www.redestb.es/personal/delpozo.**

¤

Monata Babilado

[Jen priskribo de unu el la jam kutimaj babiladoj per kiuj niaj katalunaj geamikoj utiligas Esperanton, kvazaŭ per Esperanta parlamentejo.]

La pasintan 16an de marto okazis monata babilado de niaj [katalunaj] samideanoj en la urbo Reus, kies temo estis *La progreso*.

La babilado surloke prizorgita de s-anino Luz Vázquez, malvolviĝis en la loka kultura institucio *Centro de Lectura*. Oni disponigis por ni belan aŭditorion. Denove ni devas anonci kun granda plezuro rekordan ĉeeston, al nia alvoko venis 53 gesamideanoj.

La temo, jam je la komenco, vekis grandan diskutadon. Estis multaj kaj diversaj intervenoj, kvankam ankoraŭ multaj gesamideanoj restas timemaj paroli publike. Ni esperas, ke iom post iom ili venkos tiun malkuraĝigon kio signifus gravan paŝon antaŭen en niaj celoj.


Unue oni intencis difini, kio estas progreso. Fine oni konkludis, ke progreso estas plibonigo de la homa vivo. Por atingi tiun stadion de vera progreso, nepre oni devas solvi (ankoraŭ!) multajn problemojn, kiuj estas ekonomio, kulturo kaj unualoke la socia justeco. Kiel en aliaj debatoj, tie en Reus ankaŭ troviĝis du tendencoj, unu el ili la idealisma; kies celo estas peti al homaro pli bonan kunvivadon por humanigi la socion, sed ĉi tiuj aprobindaj teorioj neniam montras la vojon irendan al tiu revata sociordo. La alia tendenco pli pragmata analizis la progreson sub vidpunkto de la reala nunatempa situacio. Poste oni eksponis la ideon, ke la progreso havas du, kvazaŭ du sekciojn, unu estas tiu, kiun ni konas kiel materian progreson, nome la atingojn de la scienco kaj la tekniko. Pri kiu ĉiuj koincidis, ke tiusence la progreso estas vera kaj reala. Je la alia flanko restas la progreso morala. En ĉi tiu punkto ankaŭ la koincido estas granda, sed ne kompleta. La rilatoj inter la homoj estas tiuj ekzistantaj de antaŭ miloj da jaroj, nome, estas iuj kiuj laboras, la plej granda parto de la homaro, kaj minoritato, kiu sin profitas de la rento de tiu laboro. Do, ankaŭ oni esprimis la ideon, ke nur vera socialismo alportos veran egalrajtan progreson por ĉiu homo. Aliaj opiniis, ke malgraŭ la grandaj maljustaĵoj ekzistantaj nunatempe, la homaro multe progresis, kaj oni metis kiel ekzemplon, la fakton ke antaŭe estis kanibaloj, sklaveco, kaj nun ne, kio montras, ke ankaŭ morale oni avancas. Oni opiniis ankaŭ ke ni eŭropanoj analizas la vivon, la mondon, laŭ niaj eŭropaj kriterioj, forgesante la aspektojn de la progreso en aliaj lokoj de la mondo, kaj oni menciis la socialajn diferencojn inter la nomataj "nordo kaj sudo". Oni diris, ke la nuna progreso devenas de la romiaj leĝoj, kiuj disdonis la

teron por plej granda produktado, sed tuj sekve aliaj opiniis, ke ĝuste tiu agado de la romia epoko signifas malprogreson, ĉar oni rajtigis al iuj homoj pri posedaĵoj, dum oni malrajtigis aliajn.

Sendube la naturo estas temo kiu priokupas nunatempe la homon. Granda parto de la babilado estis dediĉata al la naturo, kio jam okazis en antaŭaj babiladoj. Ĉu ĉi tiu senkontrola progreso mortigos la naturon? Se ni mortigas la naturon, adiaŭ al la vivo kaj al progreso. La polucio, la malplibonigo de la atmosfero, la fama truo de ozono, la senarbarigo de multaj zonoj de nia planedo estas faktoj priokupigaj.

En la socia kaj sociala vidpunktoj, se la progreso signifas, ke ĉiutage estos pli da senlaboruloj kaj ke minoritato estos pli kaj pli riĉa, la progreso alvenigos nin al kompleta katastrofo. Oni konsentis, ke se ne estas justeco, neniel povos ekzisti progreso, laŭ morala vidpunkto. Por esti vera progreso la homa estaĵo devos evolui en sia inteligenteco. La transformigo de la homaro nur dependas de la mensa evoluo. Ĉiuj konsentis, ke iom post iom la progreso atingos ĉiujn civitanojn de la mondo, sed neniu kuraĝis diri kiam kaj kiel.

La pitoreska momento de la babilado estis kiam la subskribinto sciigis al la ĉeestantaro pri la lasta demando de la temo: kiamaniere la Esperanto-Movado kontribuas al la progreso? Nu, la silento estis la respondo. Aparte de iuj mencioj pri la homaranismo de Zamenhof, oni apenaŭ pritraktis la rolon de Esperanto. Fine, la subskribinto konsideris, ke nia propono por la progreso estas la forigo de lingvaj konfliktoj, konfliktoj kiuj okazigas kverelojn kaj eĉ militojn, kaj la fakton, ke ekonomie ni povas kontribui evitante tiujn astronomiajn elspezojn en tradukadoj, ĉiam sub nia slogano, *ĉiu sian lingvon kaj Esperanto por ĉiuj*.



Kiel en aliaj okazoj ĉiuj ĉeestantoj estis malavare gastigataj per abundaj manĝaĵoj kaj refresigaj trinkaĵoj, en la trinkejo de la institucio mem.


LUIS SERRANO PÉREZ

AEU disponas korespondajn kursojn: bazan, mezan kaj superan. Diversaj prezoj, diversaj opcioj. Kaj vi ĉiam havos la helpon de koresponda instruisto. Kontaktu AEU, p.k. 864, 29080 Malago.

Informado

La kasisto de TAKE funkciigas Esperanton en la internacia flughaveno de Basel-Mulhouse

En la internacia aerhaveno de Basel-Mulhouse troviĝas aŭtomata bilet-ŝanĝilo en la alvenhalo ĉe la franca flanko. Eblas elekti inter 9 lingvoj por ricevi la klarigojn, kiuj aperas sur ekrano. Eĉ japana kaj norvega lingvoj estas elekteblaj. Kiam oni elektas



la hispanan lingvon, sur la ekrano aperas mesaĝoj: *Enmetu monbileton kaj por pliaj informoj klavo... aŭ vendo, akiro.* Ĉu vere la hispana lingvo? Tute ne! Temas ja pri tute klaraj mesaĝoj kaj informoj en Esperanto. Ĉar mi ne ŝanĝis valutojn al franca frankoj, mi ne scias pri ceteraj mesaĝoj. Ĉu eble eĉ la kvitancbileto estas en Esperanto?

Kompreneble temas pri malkongrueco inter la informoj ĉe la ŝaltileto por elekti la hispanan lingvon kaj la rezulto sur la ekrano. En postaj tagoj reĝustiga mano korektis tiun eraron gluante la vorton *Esperanto* sur la vorto *Español* ĉe la koncerna ŝaltileto. Tiel jam ne plu esta malkongrueco. Esperanto estas nun normale elektebla lingvo.

ANDRÉ GROSSMANN
EL *LA DOMO*, N. 14 (APR. 97)

Enciklopedio

Lanĉo de Esperanta LITeratura ENciklopedio (ELITEN)

La ĝenerala asembleo de OSIEK aprobis lanĉon de nova agado en la Societo: ELITEN. Temas pri projekto de Esperanta Literatura Enciklopedio. Dum la venontaj jaroj oni kolektos en datumbanko ĉies slipojn, komentojn kaj recenzojn pri titoloj, aŭtoroj kaj tradukintoj. Komisionoj prizorgos poste la redaktadon de unuecaj slipoj kaj verkadon de sintezaj artikoloj. OSIEK estas internacia societo, kiu celas la organizadon de kulture kiel eble plej altnivelaj, liberaj kaj sencenzuraj Internaciaj Esperanto-Konferencoj (IEK). Diskutado kaj interŝanĝoj, ekzemple post lekcioj kaj kursoj, samkiel turismaj aranĝoj, celantaj interkonadon kaj estimon interetnajn, kontribuas al disvolviĝo de vere internacia kulturo. Enkadre de OSIEK, diversaj laborgrupoj prizorgas apartajn kulturajn agadojn: OSIEK-premio, AERA.

Ĉe la Interreto: **http://w3.teaser.fr/~elaubacher/OSIEK/**

Solvo de la vortenigmoj, n-ro 49

B	A	L	O	T	I	L	O	■
A	L	O	J	O	■	A	F	T
L	■	G	■	N	A	B	E	T
K	L	A	R	I	G	O	N	■
A	■	R	E	K	O	R	D	O
N	E	I	■	O	R	I	O	N
O	R	T	A	■	D	■	■	E
J	A	M	■	R	I	L	E	G
■	M	O	L	A	■	A	R	O

La solvo de la dua enigmo estas: ""
Post lotumo, la gajnanto de nia premio estas ..., kiu baldaŭ ricevos, krom nia kongratuloj, sian premion.

Ĉiuj agadoj de AEU dependas nur de la duflanka kunlaboro de ĉiuj AEUanoj:

- ekonomia, per via jara kotizo
- labora, per la multaj horoj kiuj iuj esperantistoj dediĉas al la movado.

Tial, se vi legas ĉi tiun revuon kaj ankoraŭ ne aniĝis al AEU, ni petas vian kunlaboron tiurilate. Jara kotizo estas tre malmultekosta: 1900 ptoj. Se vi deziras aniĝi, sendu al ni jenan informon pri vi mem:

Nomo: .....
Adreso: ..... Urbo: .....
Poŝta Kodo: ..... Provinco / Lando: .....
Mi sendas la kotizo:
❑ perpoŝte al AEU, Apartado 864, 29080 Málaga
❑ per enspezo en la konton 17160710 de *Caja Postal* (Poŝta Ŝparkaso)
❑ perbanke (sendu al mi plian informon).
Dato .....

Subskribo: .....

Konkurso "50 numeroj de *Gazeto Andaluzia*"

Kiel sciate de niaj legantoj, antaŭ kelkaj monatoj la estraro de AEU decidis celebri ĉi tiun 50an numeron de via revuo. Tial, ni pligrandigis la numeron de paĝoj de ĉi tiu numero (48 enaj paĝoj anstataŭ 28), kaj faris alvokon en Esperantujo por beletra konkurso.

Ni ricevis sufiĉe grandan reagon el Esperantio. En nian poŝtkeston venis 17 verkoj de 11 aŭtoroj de tri kontinentoj (Afriko, Ameriko kaj Eŭropo) 9 landoj (Francio, Germanio, Hungario, Italio, Kubo, Malto, Pollando, Togolando, kaj, lastamomente, Hispanio). Satisfiga kvanto, se konsideri, ke ekŝprucis neatendita konkurenco el nova konkurso en Hispanio, kiu havas multe pli grandan rekompencon por la venkanto. Tamen, niaj konkursantoj taksis la nian ankaŭ partopreninda (kelkaj el ili sendis al ni eĉ tri konkursaĵojn).

Post la 10a de aprilo mi sendis pakaĵojn al la aliaj juĝantoj: ni povas paroli pri "tele-juĝantaro", ĉar maleblis al ni kunveni, kaj devis procedi per (ret)poŝto. La juĝantoj estis:

- Andrés Martín, prezidanto de AEU
- José Mª Rodríguez, kunredaktoro de *Gazeto Andaluzia*
- José F. Martín, kunredaktoro de *Gazeto Andaluzia,* sekretario de la konkurso.

Ĉiu juĝanto legis ĉiun verkon, aljuĝis al ili poentojn (de 0, malbonege, ĝis 10, bonege), kaj sendis la poentliston al la sekretario. Kuniginte la tri listojn, la sekretario trovis, ke la verko kiu ricevis pli da poentoj estis:

Mi kaj ri, kaj la sun'

La aŭtoro partoprenis kaŝinte sian nomon per la pseŭdonimo Zuz'. Kiu estas Zuz'? Lia nomo estas Alain Fagot, el Grenoblo, Francio. Inter liaj lastaj agadoj, ni eksciis pri radioprogramo en loka radistacio de Grenoblo.

Ankaŭ aliaj konkursaĵoj estis altkvalitaj. Laŭ la regularo de la konkurso, vi povas legi la venkintan en la sekvantaj paĝoj, kaj en la interreto, en la adreso **http://www.redestb.es/personal/delpozo/zuz.htm**. Kiel dirite ankaŭ en la regularo, ni petos permeson de la aŭtoroj por aperigi en nia ttt-ejo la plej interesajn.

Nu, ĉio estas jam dirita. Nur mankas, danki ĉiujn partoprenantojn, instigi vin legi la (laŭ ni) plej bonan noveleton kaj ... esperi je dua konkurso por nia 100a numero (ĉu en decembro 2009?).

JOSÉ F. MARTÍN, SEKRETARIO DE LA KONKURSO

Mi kaj ri, kaj la sun'

Tuj kiam revenis la sunaj tagoj, sukcesis ruza vendisto konvinki min, ke mi bezonegas ĉi tiun miraklan teĥnikaĵon. Ĝi fakte estas nur matraco por sunbanado Verdire ĝi ja aŭtomate direktiĝas por samtempa sunumado de ambaŭ viaj dekstra kaj maldekstra flankoj. Mi instaligis ĝin en parton de mia ĝardeno, kie ĝenos nek la arboj nek la najbaroj. Nun kuŝas tiu strangaĵo meze de gazono inter la altaj kaj densaj heĝoj, kiuj ĉirkaŭbaras mian komfortan bienon.

* * *

Dorse al la suno, kuŝante sur mia miraklaĵo, mi provas legi la kvindekan numeron de *Gazeto Andaluzia*. Apenaŭ eblas koncentri mian atenton. Tiuj najbaraj diabletoj krietas, ploras, koleregas, kriegas, ploregas, koleretas, kriegas, ploretas, koleras... Dume, preskaŭ ne konsciante pri la tumulto ĉirkaŭ si, la najbaro pritondas siajn arbedojn, arbetojn, arbojn, arbustojn per tondilego klakadanta. Eĉ gajaj birdetoj ne sukcesas aŭdigi siajn voĉojn. Mi lasas la gazeton fali sur gazonon. Mi almetas opakajn okulprotektilojn sur miajn okulojn. Nun tute nigras mia mondo. Orelŝtopilojn mi forgesis en la domo. Ne gravas. Mi turnas min fronte al la suno.

Daŭre aŭdeblas la najbara bruŝtormego. Kri'! Klak'! Plor'! Klak'! Plor'! Klak'! Kri'! Plor'! Klak'! Kri'! Klak'! Kri'! Bird'! Kri'! Klak'! Plor'! Kri'! Klak'!... Feliĉe afablaj sunobriloj karesas mian nudan korpon. Ili varmigas miajn ŝultrojn, miajn koksojn, miajn genuojn, miajn kubutojn, miajn femurojn, mian bruston, miajn vangojn, mian ventron. Ĉiuj muskoloj malstreĉiĝas plezurige. Mian ŝvitetantan haŭton kirlete sekigas venteto. Ĝi alportas parfumojn de freŝe falĉita herbo, de sekiĝantaj arbofolioj, de plej diversaj floroj kaj de aromplenaj plantoj. Eĉ pli facile aŭdeblas la birdetoj. Senmove mi plensense ĝuas la naturon. Kriego ĉesigas ĉiajn najbarajn bruemojn. Ili forveturu. Mia hundo transpasas sub la heĝo certe forvoronte ĉion, kion la najbara kato ne manĝis, se ne la katon mem. Sed tute ne gravas.

Silento regas nun. Kvietiĝas ĉirkaŭ mi. Sur fona susurado de la proksima rivereto simfonias nun plengorĝe birdoj kun insektoj. Ankaŭ mia matraco de tempo al tempo zumetas por teni min fronte al la suno. Ĝuinda plezuro de senombra sunbanado. Kvankam... ja ŝajnas, ke io ombras mian maleolon. Jen tre malrapide moviĝas la nevarmigita areo genuen. Tamen la instalistoj promesis, ke nenio ajn povos iam ajn ombri iun ajn parton de ia ajn korpo surmatraca. Fiuloj! Kaj decideme la ombro transpasis la genuon ŝajne al talio. Aŭ ĉu mi nur fantazias pri tiu senkaŭza malvarmiĝo de mia haŭto? Ĝi kvazaŭ sekvas miajn dezirojn karesante mian korpon sen tuŝi mian

haŭton. Certe ne hazarde evoluas tiu sento gajekscitante min. Mi verŝajne duonsonĝas.

Brueto malantaŭ mi. Pasero en arbeto. Kaj daŭre vagadas la mistera ombro. De iu vango. Tra la frunto. Al la alia. Mi atendas. Kolen. Ŝultren. Brusten, flanken. Ventren. Koksen, femuren. Mi petegas tiujn movojn. Nun ĉirkaŭ mia pubo. Agrablega sonĝeto. Io falas sur mian bruston. Malpeza. Vento ŝovas ĝin ventren. Lanugo aŭ plumeto. Plezurige. Pluen. Forflugis. Plumtuŝo ĉe la nazo. Plumtuŝo ĉe la mentono. Ĉe la frunto. Tio nervozigas min. Ĉe la lipoj, ĉe la kolo. Mi streĉiĝas. Orelo. Streĉiĝego. Kaj tute neatendite en alian orelon, flustre "Kviete". Do vere temas pri karesado. Ĉu mi leviĝu por forpeli ĉi tiun karesanton? Aŭ ĉu estas karesisto? Ĝis nun mi ŝajne ne endanĝeriĝis. Almenaŭ ne korpe. Sed anime mi jam pereis. Mi deziregas pliajn karesojn. Kaj se danĝero sentebliĝos ankoraŭ uzeblos sportoluktoj por elsaviĝi. Mi malstreĉiĝu.

Mi malstreĉiĝas. Plumtuŝo ĉe la lipoj. Mi malstreĉiĝis. Plumtuŝo ĉe la umbiliko. Mi ridetas. Ĉe la femuro. Ĉe la ŝultro. La daŭro, la vasteco, la sinsekvoj de la tuŝo varias senlogike. Jen rapida glito. Jen daŭra tuŝo. Ekscitige. Jen surbruste. Jen interkrure. Frenezige. Ĝuige. Mi spiras laŭ la ritmo de la tuŝoj. Malregule. Profunde, apenaŭ. En. El, en. En, el, el, en. El. Paŭz'. Akriĝas mia deziro. Se ne baldaŭ reekos la tuŝoj, mi ploros. Tuŝ'. Suspir'. Ĝuego. Ŝajnis humida ĉi lasta tuŝo. Kaj humida jena glito ja estas. Gut'. Humidaj karesoj plektas reton ĉirkaŭ mian nudecon. La suno sekigas la fadenojn. Sed restas la sento. Fadenoj kvazaŭ sendependе moviĝas. Ili premas mian haŭton. Ondadas kiel fingroj karesantaj ĉiujn erojn de mia korpo. Dekoj, centoj, miloj da fingroj ĉirkaŭirantaj miajn nervojn. Intensa kaj profunda karesado. Ĉu karesisto aŭ sorĉisto. Ne eblas respondo. Ne taŭgas demando. Ĝuenda plezurego. Frakasanta ondego de orgasmo. Ĝojplena eksplodego. Kolaps'.

Langego lekas mian vangon. Mia hundo revenas sub la heĝon. Ĝi bruas same kiel tiam, kiam ĝi foriris. Sed kiu lekis mian vangon? Mi malmetas miajn okulprotektilojn. Suno brilegas. Ĝi blindegas min. Trans duonfermitaj palpebroj mi rekonas la langon, kiu denove lekas mian vizaĝon. Sed kiu bruas sub la najbara heĝo? Mi provas alrigardi sed distingas nenion. Ne plu bruas. La suno baldaŭ malaperos malantaŭ la altajn heĝojn. Mia hundo insistas por ke mi zorgu pri ĝi. Kia sonĝ'! Sed nun ek al la dom'.

* * *

Hodiaŭ pluvetadas. Jam de horoj, rigardante tra la fenestro, mi karesadas mian hundon. Mi revetas pri morgaŭ: suna tago kun tondilego klakadanta. Mi kaj ri, kaj la sun'.


Vortenigmo

Ĉi tiu speciala numero de *Gazeto Andaluzia* meritas specialan enigmsekcion. Ĝi konsistas el du enigmoj: ega vortenigmo kaj silaba vortenigmo. Ankaŭ la premio estas speciala: libroj, muziko, komputilaj programoj... La limdato estas la 15a de aŭgusto.

Horizontale

1 Unu el la grandaj Antiloj.
6 Monato de la franca revolucia kalendaro.
12 Malantaŭo de la kapo.
16 Konjunkcio.
17 Ripetita konsono.nto
18 Falfolia arbo, simila al la poplo.
19 Afero, pri kio oni parolas (nur konsonoj).
21 Stri' el ŝtofo, ledo ktp. por ĉirkaŭigi la talion
22 Fermilo.
25 Malbelega.
26 Loko en kiu naskiĝis homo.
28 Farotaĵo, necesa pro leĝo, moralo aŭ konveno.
29 Surprizo pro io stranga, nekutima, neatendita.
30 Ebla kontraŭul'.
31 Rilata al membro de asocio.
32 Cito por senkulpigo.
34 Ne definitiva.
36 Anestezi.
38 Land' azia.
39 Prepozicio
40 Artikolo (inverse).
41 Rokspeco, uzata i.a. por fari tegmenton.
43 Nekapabl' bone vidi.
44 Saluti iun.
46 Estaĵo kapabla naski.
47 Miskrononci la siblajn konsonojn.
49 Metalo.
51 Herbo, kies grajno estas grava greno farunebla.
53 Ostaro de la piedradiko.
55 Anglalingva honorigo por kavaliroj (inverse).
56 Tia, ke ĝi movas ion al si.
58 Hav' koran inklinon al iu.
59 Genro de insektoj kiel la pediko.
61 Interjekcio.
63 Nordafrika simi', kiu ankaŭ troviĝas en Ĝibraltaro.
64/82 Titolo de revuo esperantlingva (du vortoj).
67 Sistemo de regado, iniciatita de Diokleciano, laŭ kiu la Romia Imperio havis kvar imperiestrojn.
69 Konsonnomo.
70 Afrika lando.

(Daŭrigo sur la paĝo 28)



(Daŭrigo de la paĝo 25)

72 Sufikso.

73 Prepozicio (inverse)

74 Egipta dio de la suno (inverse).

75 Religio, speciale disvolviĝinta en Japanio.

77 Inverse, an' de indiana tribo kiu donis sian nomon al nordamerika lako.

79 Antikva nomo de Irlando.

81 Prepozicio.

82 Vidu 64

86 Rilata al horizontale 46

88 Egipta river'.

90 Monat'-

91 Celenteruloj kiel la meduzo.

94 Ĉefurbo de Kanado.

96 Neoficiala sufikso.

98 Rilata al iu speco de kolombo.

99 Ekstera.

100 Angla biero.

102 Antologi'.

106 Prefikso.

108 Homo pretiganta la vojon al novaj ideoj.

110 Maluest'

111 Iru de unu loko en alian.

112 Individuo.

114 Franca senkapigil'.

116 Fontejon en la dezerto.

119 Prepozicio.

120 Malsud'.

121 Frato de Moseo.

122 Poŝta kodo de Hispanio.

123 Plej fama latinlingva epopeo.

Vertikale

1 Rivero enfluanta en la Mortan Maron.

2 Mense perturbita.

3 Birdo.

4 Instigi, persvadi, atingi, ke iu faru ion.

5 Greka vorto por "orelo".

6 Veturil'.

7 Araba suvereno.

8 Punkto kie kruciĝas vojoj.

9 Inverse, grand' en vertikala dimensio.

10 Duobla vokalo.

11 Baza komunik-unuo de la homaro. (inverse)

13 Fabriko por metalproduktado

14 Prepozicio.

15 Frakcio

20 Protektado kontraŭ oksidiĝo aŭ rustiĝo.

23 Indiana lingv' de Paragvajo.

24 Trebo horizontale metita sur la fostoj de pordo aŭ fenestro.

26 Esprim' opinion kontraŭan.

27 Ludi iun gitaroforman instrumenton.

29 Konsonnomo.

30 Rebonigo de io difektita. (inverse)
32 Malordigite, lingvo artefarita.
33 Iri en ies hejmon.
34 Malpoezi'.
35 Nordamerika krokodil'
37 Navig' tien kaj reen.
38 Du.
42 Inverse, gento.
43 Prefikso.
44 Stang' ĉirkaŭ kiu turniĝas peco de maŝino.
45 Prefikso kiu signifas 10^9 (miliardo) (Inverse)
46 De alia, pasinta tempo.
48 Entenas pozitivajn erojn de la atomkerno (sen finaĵo)
50 Koloro.
51 Ŝarĝilujo de pafilo, fotografilo...
52 Okazi en granda nombro da okazoj.
54 Kanada ŝtato.
56 Prinçipo de iu ĉina religio.
57 Amanto de Verona.
60 Egipta dio de la scienco.
62 Hindia lingvo, skribita de islamanoj per la araba alfabeto.
63 Nom' de persa reĝo.
65 Budhisma skol'.
66 Malordigite, spirebla gaso.
68 Far' ion el nenio.
71 Denove 58 horizontale.
74 Impeto (inverse).
76 Plej bona parto el aro.
78 Sufikso.
80 Politika unuiĝ' de ŝtatoj (inverse).
83 Verkist' kiu provas enkonduki en lingvon vortojn ĝis tiam ne uzatajn.
84 Iu cetac'. (inverse)
85 Spirita medio, laŭ la hindoj (inverse)
87 Spermelĵeto.
89 Muzika tono.
91 Ĉefurbo de la antikva Kreto.
92 Rilata al artefarita lingvo malpli sukcesa ol Esperanto.
93 Stato de glacio fondiĝanta (inverse)
95 Eligi ĝemajn kriojn.
97 Prepozicio.
98 Malgranda.
101 Posesivo.
103 Taĉmento de soldatoj.
104 Prepozicio.
105 Dezir' havi ion, kion alia havas. (inverse)
107 Prepozicio.
108 Prepozicio.
109 Instrumenta.
113 Konjunkcio (inverse).
115 Sufikso.
117 Granda mediteranea fiŝ'
118 Sufikso.

SIZIFO

Melilo: 500 Jaroj de Historio

Inter ĉiuj la multaj popoloj de Hispanio, Melilo estas, sendube, unu el la plej senegalaj kaj specialaj. En ĉi tiuj tagoj, ĉi tiu urbeto nordafrika kaj multkultura festas la kvinan jarcenton de historio en Hispanujo. La deveno de ĉi tiu dato estas la signo de nia spirito kaj, samtempe, de nia vera esenco: la miksado.

Antaŭ la 17-a de septembro de 1497 Melilo havis longan kaj profondan pasintecon. La unua granda popolo kiu lasis spurojn de sia ĉeesto estis la fenicoj. En sia komerca malstreĉado ili okupis ĉi tiun teron, ĉar ĝi estis punkto tre grava por la komercado. Ili nomigis ĝin RASADIR (t.e. terkapo granda), nomo kiu estas la deveno de la nomo RUSADIR.

Poste, Kartagio okupis Melilon, kiel punkton de kontrolo mediteranea en la Punikaj Militoj.

Evidente, Romo kontrolis ĉi tiun regionon dum ĝia malstreĉado tra la Mediteranea Maro. En tiu tempo, Melilo apartenis al la provinco Mauritania Tingitana.

Kiam la Roma Imperio falis, la Melila zono estis okupita de du popoloj. La vandaloj (kiuj trapaŝis sole) kaj Bizancio en ĝia malstreĉado militista kaj ekonomia pro la rekonkero de la Roma Imperio.

Kun la muzulmanaj popoloj (araboj, bereberoj, k.t.p.) Melilo trapasis diversajn etapojn. Dum la Omeja Imperio, ĝi apartenis al Al–Andalus, havante propran ekzistecon dum la 10a jarcento. Precize la deveno de la vorto Melilo estas arablingva, kaj ties signifo ekzakta estas nekonata. La dekadenco komencis kun la disiĝado de Al-Andalus (regnoj de Tajfoj: 1067–1081), kaj kun la invadado de la Almoravidoj (1081–1142) kaj la Almohadoj (1142–1216). En 1216, sub la estrado de la Benimerinoj, Melilo estis urbo hispana–muzulmana. Finfine, Melilo estis abandonata kaj falis sub la kontrolo de la regno de Fez.

En ĉi tiu etoso de ekonomia kaj demografia abandono tuta, ekis la okupado de Melilo fare de Hispanio. En la finaj jaroj de la XV–a jarcento Hernando de Zafra pritraktis la studadon geografian de Melilo kaj la *Bula Inefabilis* (1495) ebligis la okupadon de la zona malkovrita de Hispanio, kun oficiala signo. En 1497, D. Pedro de Estopiñán, kondukante kelkajn trupojn, okupis Melilon por la Duko de Medina–Sidonia. Kial? Oni povas trovi la jenajn kaŭzojn historie:

–Redutoj, kiuj apogis la muzulmanojn kiuj rezistis la trudon fare de la Katolikaj Gereĝoj iĝi kristanoj;

–malstreĉado ekonomia kaj militista;

–fortigado de la nova Hispanio;

–luktoj kontraŭ la piratoj.

Sed, kial okupis Melilon la Duko de Medina–Sidonia kaj ne la Gereĝoj? Ĉar:

–li havis grandan povon kaj ŝiparon;

–la duko elstaris kiel luktanto kontraŭ la muzulmanoj;

–ekde 1489 la Duka Domo havis la Kapitanecon Ĝeneralan de la Maro Oceana;

–malabundo da riĉaĵoj.

Ekde 1502 Melilo apartenis al Hispanio kaj ties reĝoj kaj estis, baze, punkto de kontrolo, malstreĉado kaj proksimigado al Afriko ena kaj fora. Melilo en tiu tempo rezistis sukcese plurajn atakojn de la sultano de Fez. Kiam paŝis la Ora Aĝo de Hispanio, Melilo estis, preskaŭ ĉiam, forgesitaj kaj abandonataj punlaborejo kaj kazerno, kiuj kuraĝe rezistis, preskaŭ ĉiam sen apogo duoninsula. Escepto grava estis la lukto apogita de la reĝo Carlos III kontraŭ popoloj de la oriento.

Dum la XIX–a jarcento Melilo ŝanĝiĝis malrapide. Ekde Malago, baze, enmigris personoj, iuj ajn gejudoj, ĉar kreiĝis komercaj interesoj. Oni kreis Juntas (Unuiĝojn), la havenon kaj la Río de Oro (Rivero de Oro) deturniĝis (pro tio la paludismo malkreskis). Unuvorte, Melilo malfermiĝis pro la komerco ĉar:

–Hispanio bezonis ekonomian malfermigon suden;

–Hispanio volis malstreĉadon militistan suden (Rif) pro la Kongreso de Berlino (1888).

Ĉi tio ebligis la apogeon de la Gaudieska Modernismo en la arkitekturo pro la verko de Enrique Nieto (Enrike Njeto). En ĉi tiu epoko la landlimoj de la nuna Melilo baze establiĝis.

Dum la Kampanjoj de la Rif (1909–1925) la graveco milita de Melilo ebligis ĝian apogeon politikan kaj ekonomian.

Poste Melilo kreskis demografie kaj ekonomie, sed post la Verda Marĉo (1974) la senbaza historie puŝado maroka kaj la ekonomia situacio de Hispanio kreis malantaŭeniran etoson . Ĉi tiu etoso malboniĝis kiam en la 80a jardeko la registaro de Hispanio kreis la *Ley de Extranjería* (Leĝon de Fremdeco), riskante la situacion de la muzulmanaj melilanoj, baza ero de nia ekonomio. La muzulmanoj riklamis sian rajton esti konsideratoj hispanoj kaj ĉi tion profitis Maroko. Bonfortune, Melilo superis ĉi tion kaj iĝis multkultura urbo en ekvilibrio.

Hodiaŭ, Melilo estas urbo ekonomie bazata en la komerco, multkultura kaj ekzemplo de kunvivado inter la eŭropanoj, la rifanoj aŭ bereberoj

(kies kulturo kaj lingvo estas persekutataj en Maroko), la judoj , la hindoj kaj la ciganoj. Urbo, kiu volas kreski foren ekonomie kaj enen aŭtokonscie.

JOSÉ ANTONIO VALVERDE MARTÍN

Memore al bona amiko

Ĵus forpasis andaluzi-madrida amiko Juan Carlos RUIZ SIERRA. Ja, Juan Carlos madridumis sed li naskiĝis en la kordova vilaĝo Peñarroya-Pueblonuevo, urbo tradicie minista ĉe la nordo de la provinco.

Mi konis Juan Carlos en 1982, kiam mi decidis ĉeesti la Hispanan Kongreson de Esperanto; estis la unua renkontiĝo kie mi partoprenis. Ĝis tiam mi persone konis neniun esperantiston kaj mia lingvo-sciado estis mezbona. Dum la unua tago de la Kongreso okazis la interkona vespero: malgraŭ la agrabla etoso de la samideanaro kaj la bonega akcepto de la malagaj esperantistoj mi decidis reveni baldaŭ al la restadejo. Sed kiam mi estis apud la elirpordo de la E-klubejo, eniris, ĝuste tiam, grupeto da madridaj junaj samideanoj, inter ili Juan Carlos. Kompreneble mi ne foriris, mi ekĝuis la etoson kaj mi ekkomprenis tiam kion signifas vere la vorto "samideano", kaj tio dank' al la afableco kaj simpatieco de Juan Carlos.

Mi laste memoras pri tiu interkona vespero la fakton ke je la tria matene aro da junuloj promenadis tra la malaga urbocentro kriante fiere ke ni estis esperantistoj. Antaŭ ni ĉiam estis Juan Carlos; li instruis al ni kantaĵojn, klarigis kial estas utila internacia lingvo ĉe junularaj rondoj ke Esperanto estas aktuala kaj ne nur akademia lingvo. Ja, mi devas agnoski ke mia unua persona kontakto kun la Eo-Movado okazis pere de li.

Unu jaron poste Juan Carlos ĉeestis la Unuan Andaluzian Kongreson de Esperanto. Andaluziaj gesamideanoj invitis madridanojn, ili sendube povis helpi nin rilate la organizadon de la movado en Andaluzio. Antaŭ kelkaj tagoj mi serĉis ĉe mi miajn fotografaĵon pri tiu kunveno, mi havas multajn sed nekredeble Juan Carlos aperas en neniu el ili, kial? Mi fine komprenis ke li estis la fotografanto, jes ja li ĉefrolulis aktive ĉiuloke.

Mi vidis lastfoje lin fine de la jaro 1995, pro laboraj kialoj mi vizitis Madridon kaj mi profitis la okazon por ĉeesti la lundan konversacian rondon. Tie li estis denove, ni memoris aferojn pri Kordovo, pri Andaluzio, pri ambaŭ kongresoj. Li samtempe demandis, respondis, intervjuis, agadis, konsilis. Li parolis pri Esperanto, pri rokoj, pri

(Daŭrigo sur la paĝo 38)

Formikoj kaj Elefantoj


Mokeme aŭ kruele unu el la preferaj agadoj de ne-esperantistoj kiam alia persono lernas la internacian lingvon estas fajfi pri li. Mi tion neniam bone komprenis pro la fakto ke post multaj jaroj da esperantisteco, mi konsideras ke paroli la zamenhofan lingvon estas normala agado, nur okazas ke ankoraŭ ekzistas kelkaj milionoj da pesonoj en la mondo kiuj ne estas esperantistoj. Ĉu vere? Jes, tamen l'o plej kutima estas paroli Esperanton.

Kiel do? Ĉu Vi ne kredas min? Vidu, kiam mi eklaboris, jam antaŭ kelkaj jaroj, mi gluis sur tajpmaŝino verdstelan algluaĵon kun la jena teksto "Esperanto, lengua internacional" (traduko por nehispanlingvanoj: "Esperanto, internacia lingvo"). Per ĉi akto mi deziris provoki reagojn kaj tiel eble labor-kunuloj demandus al mi "Kio estaś tio?" Sed, kio ja okazis? Nu, la unua reago provokita estis de kunulo kiu demandis al mi en perfekta Esperanto: "Ha! Ĉu Vi parolas la internacian lingvon?" Imagu mian surprizon, "jes, kaj Vi?" Mi respondis, "Kompreneble Jes!" diris li. Poste li rakontis al mi en la hispana kiamaniere li eklernis la lingvon kun aliaj amikoj kiam li studis en la Universitato, li indikis al mi ke kvankam li ne apartenas oficiale al la Esperanto-Movado, li konsideras sin mem esperantisto.

Kelkaj jaroj poste mi eklaboris en alia oficejo. Tiufoje mi ne emis propagandi la lingvon tiel dise, tamen la studoj de la lingvoj aperis en konversacio kun aliaj kunuloj, kaj ene de la parolado oni menciis la eblan bezonon de komuna help-lingvo. La posta konkludo estis kurioza, unu el la konversaciantoj, krom mi, eklernis la lingvon dum sia juneco, alia paroletis ĝin, alia havis bonan amikon kiu parolis Esperanton perfekte. Kurioza afero, ĉu ne?

Sed la lasta anekdoto okazis antaŭ kelkaj semajnoj. En la malantaŭa parto de mia aŭtomobilo mi fiksis metalan gluaĵon kun la vorto "Esperanto" kaj verda stelo; antaŭ du semajnoj mi haltiĝis en benzinejo de mia urbo. Mia peto estis

(Daŭrigo sur la paĝo 42)



Paĝoj de nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

Kiamaniere komenciĝis la dua epoko de *Gazeto Andaluzia*


Permesu al ni ke ĉi-foje, kun la celo festi la numeron 50an de nia revuo, ni ne parolos pri la komencoj de la Esperanto-Movado en Andaluzio en la komenco de la jarcento kiel kutime, sed pri kiamaniere naskiĝis ĉi revuo mem, fakto kiu okazis nur antaŭ 14 jaroj.

Unu el la ĉefaj rezultoj de la Hispana Esperanto-Kongreso okazita en Malago en la jaro 1982 estis la konscio pri la ekzisto de komencanta Esperanto-movado en Andaluzio, kio ja okulfrapis per la longdaŭra ekzisto de la Sevila Esperanto-Akademio, la laboroj de la Grupo de Esperanto de Malago kiu eĉ kuraĝis organizi nacian kongreson kaj la ekzisto de malgranda grupeto en mezgrada lernejo de Kordovo. Do, ĉi tri grupoj decidis renkontiĝi en Kordovo en la jaro 1983 por paroli pri la disvastigo de la internacia lingvo en Andaluzio kaj pri la organizado, se eble, de regiona esperantista asocio.

La kunveno okazis dum varma semajnfino en la monato aŭgusto en Kordovo: pli malpli 25 gesamideanoj de la tuta Andaluzio renkontiĝis, kaj sendube la du plej gravaj decidoj estis pristudi la eblecon fondi esperantistan asocion ekredaktante la statutojn, kio definitive okazis en la jaro 1984, kaj ekeldoni esperantistan gazeton komuna por ĉiuj andaluziaj grupoj. La proponita nomo por la nova revuo estis ***Andaluzio***.

Koincide kun la unuaj kontaktoj de la andaluzia esperantistaro reaperis ene de la libroj kaj ĵurnaloj de la plej maljunaj esperantistoj, ĉefe en la enhavoriĉa arkivo de Samideano Rafael FIOL de Sevilo, informojn pri la esperantista movado en Andaluzio en la komenco de nia jarcento, ĉefe de 1909 ĝis 1929. Inter tiuj esperantaĵoj troviĝis kelkaj ekzempleroj de antikva esperantista bulteno, la unua eldonita en Andaluzio: ĝia nomo estis ***Gazeto Andaluzia***, kaj la direktoro José Garzón Ruiz, prestiĝa advokato de San Fernando (Kadizo), kiu eldonis la revuon dum la jaro 1909 (12 numeroj) kaj dum 1910 (aliaj 12 numeroj sed jam sub la nomo ***Gazeto Hispana***).

Do, koninte la praekziston de tiu revuo, oni decidis ŝanĝi la nomon de la projektata revuo kiu ekde tiu momento ricevis la nomon ***Gazeto Andaluzia***. Eĉ ekde la dua numero oni adoptis la litertipon uzata en la originala andaluzia revuo, kvankam aperigante ankaŭ la andaluzian kaj la esperantistan standardojn kaj la andaluzian devizon: **Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro**.



Por eldoni la revuon oni organizis la taskojn laŭ tri partoj. Unue la kordova grupo eldonis ĝin, ili kolektis la artikolojn, kompostis la paĝojn kaj presis la revuon mem. Due, la sevila grupo dissendis ilin kaj trie la malaga grupo organizis la propagandon de la revuo, abonan servon kaj ĉion rilata al la ekonomia sukceso de la projekto. Tiele okazis: la unua revuo aperis, laŭ akordite, en la monato januaro de 1984, entute estis 12 paĝoj kie aperis informoj pri la esperantista vivo en Andaluzio, historiaĵoj, programo de la 2-a Andaluzia Kongreso de Esperanto, okazonta en tiu jaro en Malago, paĝo dediĉata al la junularo, alia al la radio kaj eĉ recepto pri la ellaborado de la bongusta andaluzia *gaspaĉo*.

Nu, la revuo multe ŝanĝiĝis numeron post numero: oni presas ĝin dukolore, aperis kelkfoje eĉ fotografaĵoj, oni pligrandigis dum kelkaj jaroj la formaton kaj precipe oni bonvenigis la kunlaboradon de multaj novaj gesamideanoj. Tamen la revuo estas fidela al la originala projekto, t.e., esti la voĉo de la esperantista movado en Andaluzio kaj de la organizo AEU, kaj pro tio ĝi volas resti tute malfermita por ĉiaj kunlaboroj kiuj celas disvastigi la internacian lingvon en nia andaluzia lando por antaŭenirigi la ideon en Hispanio unue kaj al la tuta mondo poste, kiel admonas la andaluzia devizo kiun ni surkovrile orgojle aperigas.

Ĉi konitaĵojn ni povas oferi al Vi dank' al la ekzisto de la Arĥivo de AEU, kie ni pretendas gardi ĉion rilatan al la Esperanto-Movado en Andaluzio. Verŝajne ni tro pretende nomas tiun sekcion Arĥivo, malgraŭ la fakto, ke ĝi estas nur kolekto de antikvaj ĵurnaloj kaj esperantaĵoj. Tamen, ni volas krei veran arĥivon, la arĥivon de Via memoro. Do, se Vi ne scias kion fari kun Viaj E-revuoj aŭ esperantaĵoj kaj Vi estas preta doni ilin al ni, bv. kontakti kun ni. Ni pagus ĉiajn sendokostojn.

HISTORIA ARĤIVO DE AEU
POŜTKESTO 611
E-14080 KORDOVO

Intima kunvivulo

Mi konatiĝis kun Esperanto jam en 1946, kiam mi estis ankoraŭ dekdujara, en Usono. Tiutempe ĝi estis nur kuriozaĵo por mi, kvankam interesa kuriozaĵo. Mi estis en la unua jaro de la mezgrada lernejo, kaj jam komencis studi la Hispanan lingvon, kiu tiam estis kaj nun ankoraŭ restas unu el la plej popularaj studtemoj en Usonaj lernejoj, pro la proksimeco de hispanlingvaj landoj. Mi intencis baldaŭ ankaŭ komenci studadon de la Franca lingvo. Iel mi jam sciis kio estas Esperanto, kvankam nur hazarde mi akiris broŝureton en kiu estis instruata kelkaj komencaj lecionoj kaj troviĝis kelkaj facilaj legaĵoj. La kontrasto inter Esperanto kaj la aliaj lingvoj estis giganta: post dudek tridek horoj da enhejma studado mi jam povis flue, kvankam ne tute korekte, skribadi en Esperanto kaj legi pres-kaŭnormalajn tekstojn. Mi do elserĉis kaj ekabonis Usonan gazeton Espe-rantan, kaj en la urboĉefbiblioteko trovis kelkajn tre malnovajn sed tre uzeblajn Esperanto-instrulibrojn.

Nu, de tiam mi uzas Esperanton. Mi loĝas nune en Aŭstralio, kiu per la Internet tute ne estas malproksima de la cetera mondo, do ĉiutage aktive uzas ĉi tiun nian lingvon. Mi de ĉiam estas librovoranto. Ĉu mi konfesu ke, malgraŭ dekjara universitata studado de la Hispana lingvo mi neniam suk-cesis plenlegi Hispanlingvan roma-non sen konstanta uzado de vortaro kaj multa dubado pri la signifo de individuaj esprimoj? La Hispana estas grandioza lingvo, kies kulturhistorio estas elstare grava kaj granda. Pro tio, eksterulo neniam sukcesas plene alproprigi ĝin. Esperanton instruis mi al mi mem, mi neniam studis Espe-ranto-kurson nek en klaso nek perkoresponde. Esperanto estas ankaŭ grandioza lingvo, kies kulturhistorio estas (kongrue kun ĝia negranda aĝo) ankaŭ elstare grava kaj granda. Tamen mi ne plu estas eksterulo. Ĉu mirigas ke mi legas romanojn en Esperanto sen uzado de vortaro kaj kun plena kompreno? La Hispana lingvo do estas amata amiko; Esperanto estas intima kunvivulo. Diferenco, ĉu ne?

D-RO DONALD BROADRIBB


(Daŭrigo de la paĝo 34)

fungoj, pri steloj, pri tiom da aĵoj... Mi estis apud li nur tri fojojn dum mia vivo, entute apenaŭ kelkaj horoj, sed kiamaniere povas influi persono en nia vivo kiam li estas speciala. Kiam pasas la jaroj oni komprenas la gravecon de personoj kiuj iam influis en nia vivo. Kelkfoje tiu influo ŝajnas ne-grava sed kiam ni observas tiujn personojn en la temp-distanco ni valoras ĉion kion ili agis kaj kiamaniere tio impulsis nin. Jes tio verdire nomiĝas *Amikeco*.

J.M.R.H.

Jura Tribuno Internacia, nova revuo eldonota en Andaluzio

La venontan someron aperos en Esperantio nova faka revuo sub la nomo *Jura Tribuno Internacia*. Temas pri bulteno pri juraj temoj eldonota de Esperanta Jura Asocio (EJA) kun la helpo kaj apogo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. La nova revuo eldoniĝos en Andaluzio kaj ĝi estos disvastigata inter ĉiuj membroj de EJA en la tuta mondo kaj al ĉiuj personoj kiuj emas legi pri juraj temoj. La redaktoro estas la kunredaktoro de *Gazeto Andaluzia*, nia kordova samideano José María Rodríguez. La unua numero aperos okaze de la venonta Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en la aŭstralia urbo Adelajdo. Kurioze, la prezidanto de la Loka Kongresa Komitato, S-ro Kep ENDERBY estas samtempe la prezidanto de Esperanta Jura Asocio. La revuo aperos unufoje en la jaro, okaze ĉiam de la Universalaj Kongresoj kaj ĝi aperigos artikolojn kaj recenzojn pri juraj temoj. Interkrampe ni diros ke la lasta jura revuo estis la prestiĝa *Internacia Jura Revuo*, kiu ĉesis en la jaro 1987.



Laŭ indikoj de la redaktoro, la unua numero enhavos artikolojn de Anna RITAMAKI (Finnlando) pri la rajtoj de la minoritatoj; de Kep ENDERBY (Aŭstralio) pri la leĝa situacio de la aborigenoj en Aŭstralio; de Rafaela URUEÑA (Hispanio) pri la lingva reĝimo de la Eŭropa Unio kaj de J.M. RODRÍGUEZ (Hispanio) pri la rajto je la mem-determinacio en la malkoloniigo de Orienta Timoro. Krome aperos traduko de internacia kunveno pri diplomatiaj rilatoj fare de Ralph HARRY (Aŭstralio), praktikaj sciigoj pri aŭtoraj rajtoj kaj diversaj mallongaj informoj pri aktualaj juraj temoj. Entute la unua numero enhavos preskaŭ cent paĝoj.

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo akceptis la proponon de la redaktoro apogi la projekton eldoni mondskalan juran revuon verkita en la internacia lingvo kaj ni esperas ke ĝi estos sukcesa kaj utila por montri al ĉiuj ke en nia lingvo eblas verki pri ĉiuj temoj kaj samtempe diskonigi iom pli la ekzisto de nia andaluzia asocio.

Se Vi deziras koni pliajn detalojn

(Daŭrigo sur la paĝo 44)

Radioamatora Angulo

Internacia Lingo de Esperantistaj Radioamatoroj (ILERA) estas asocio kie renkontiĝas la radioamatoroj kiuj uzas la internacian lingvon. Ĉi asocio naskiĝis dum la Universala Kongreso okazita en la jaro 1970 en Vieno, kvankam la unua asocio kie aniĝis la esperantistaj radioamatoroj estis fondita en Francio en la jaro 1925.

ILERA hodiaŭ estas asocio kun pli malpli 500 membroj en 27 landoj. La ILERA-anoj, krom la radiaj kontaktoj, interŝanĝas opiniojn ankaŭ en bulteno aperanta 3-4foje jare en la jaro. Diversaj diplomoj estas disdonataj al radioamatoroj laŭ la nombroj de la radio-kontaktoj kaj krome fiksa radiostacio de ILERA funkcias okaze de la Universalaj Kongresoj de Esperanto.

Se vi emas radiokontakti jen la horoj kaj frekvencoj kie renkontiĝas la ILERA-anoj laŭ zonoj:

Eŭropo:		
Dimanĉo kaj Lundo	14.266 MHz	je la 12'30 UTC
Lundo kaj Vendredo	7.066 MHz	je la 08'30
Merkredo	3.633 MHz	je la 19'45
Lundo	3.770 MHz	je la 17'00
Ĵaŭdo	3.770 MHz	je la 16'00
Pacifika Oceano		
Sabato	21.266 MHz	je la 22'00
Sabato	21.266 MHz	je la 24'00
Sud-Ameriko		
Sabato kaj Dimanĉo	14'266 MHz	je la 20'30

Ankaŭ jen la voknomoj de la reprezentantoj de ILERA laŭ landoj:

Aŭtralio:	VK2ET	Japanio:	JA1FXZ
Aŭtrio:	OE3FNN	Koreio:	HL1CAN
Brazilo:	PT2CA	Latvio:	YL2GVK
Britio:	G0NUE	Lituanio:	LY2FN
Bulgario:	LZ2LI	Neder-	PA3FLC
Ĉekio:	OK2LS	Pollando:	SP6VGS
Ĉinio:	BY5HEY	Portugalio:	CT1CGE
Francio:	F9ED	Rumanio:	YO5OCP
Germanio:	DL1CC	Rusio:	RW9YE
Hispanio:	EA5DR	Svedio/	SM5DAD
Hungario:	HA7PW	Svisio:	HE9JLT
Israelo:	4Z4LX	Ukrainio:	UT2WL
Italio:	I2YLG	Usono:	WB4TNC

ECB7-I-046745 / Stacio ESPERANTO

Fonduso Germain Pirlot

ĉe la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino

1. Celo

Fonduso por la akcelo de la eldonado en Ilo (Internacia Lingvo Esperanto) de sciencaj verkoj laŭ la kriterioj de la Akademio de la Sciencoj San Marino (AIS).

Neniel ĝi celas librojn kies kerna enhavo apartenas al esperantologio aŭ interlingvistiko.

2. Organoj

La Senato de AIS estas la gvida organo de la Fonduso; ĝi povas starigi Prezidantaron de minimume tri personoj el inter siaj membroj por la prizorgado de la investoj kaj cele al la prezento de la jara spezokonto kaj buĝeto al la Senato.

3. Havaĵo

La kapitalo estas netuŝebla kaj konsistas el bazaj donacoj fare de la fondinto kaj aldonaj donacoj fare de aliaj personoj; krom 1/10 de ĉiuj interezoj ĉiujare estas atribuita al la baza kapitalo kun efiko je la 1a de januaro.

La nomo de la donacinto de minimume 5 AKU estos menciita en publikaĵo de la Fonduso.

4. Premio

La premio konsistas el minimuma sumo de 5 AKU kaj estas ĉiujare atribuota, por la unua fojo en 1993.

La verko estu prezentita al la Senato per alsendo de propono al la senata sekretariejo antaŭ la 1a de marto. La Senato decidas dum la unua sesio post tiu dato.

Se pro malalta scienca nivelo la premio ne estu agnoskebla, la duono de la rento reiru al la kapitalo kaj la alia duono al la Subtena Sektoro de AIS.

5. Kondiĉoj

La verko estu originale verkita en Ilo, eventuale en Ilo kaj naciaj lingvoj, sed almenaŭ la duono de la tekstoj estu verkita en Ilo.

La publikigo okazu en la kalendara jaro aŭ dum la kuranta jaro antaŭ la prezento ĉe la senata sekretariejo. Publikigo de prespreta verko post la decido akcepteblas, sed tiam la premio estos pagata nur post la aperigo de la verko.

Estu minimume du kandidatoj por ke la premio estu agnoskebla, krom en kazo de unika sed altgrade elstara verko laŭ unuanima decido de la Senato.

Se la kondiĉo ne estas plenumita, verko el la koncerna jaro povas

kandidatiĝi ankaŭ dum la sekvaj jaroj, ĝis troviĝos almenaŭ du kandidatoj kun sufiĉe scienca nivelo.

6. Aŭtoro

La aŭtoro, aŭ la kompilinto (redaktinta eldonisto) devas esti AIS-ISK-ano (membro de la Internacia Sciencista Kolegio laŭ la regularo de AIS) dum almenaŭ 5 jaroj.

7. Rentumo

Se la enspezigita rento atingas minimume 20 AKU, tiam, post la aplikado de artikolo 3, 2/10 eniras la spezojn de la Subtena Sektoro de AIS, 7/10 estas destinitaj por la premio.

La fondinto garantias la ĉiujaran elpagon de minimume 5 AKU.

8. Likvido

En kazo de likvido de AIS, aŭ se ĝi elektas alian planlingvon ol Ilo por siaj translimaj kontaktoj, la kapitalo transiru al Universala Esperanto-Asocio, institucio laŭ nederlanda juro kun sidejo en Rotterdam (Nieuwe Binnenweg 170), Nederlando, aŭ al samcela organizaĵo se UEA ne plu ekzistus, cele al la daŭrigo de la Fonduso G. Pirlot por la akcelo de la eldonado en la internacia lingvo Esperanto de sciencaj, teknikaj, artaj kaj ekonomiaj verkoj.

AKU: Akademia Kotiz-Unuo, nun 105 germanaj markoj, 100000 italaj liroj.

■ ■ ■ ■ ■ ■ ■ ■ ■ ■ ■ ■ ■ ■ ■ ■ ■

(Daŭrigo de la paĝo 35)

tre simpla "Llénelo, por favor" (trad. "plenigu ĝin, mi petas"). Sed la respondo de la benzinistino estis rapida, rekta kaj en perfekta Esperanto "Ne, ne, diru tion al mi en Esperanto", ŝi diris. Mia surprizo provokis ke unuamomente mi ne sukcesis trovi la adekvatajn vortojn, do mi respondis nur "Sed, ĉu Vi estas esperantistino?" "Jes!" Ŝi respondis al mi, "Mi lernis ĝin en Madrido en la Liceo".

Ĉi aferoj, kaj aliaj kiuj ne enestas en ĉi artikolo, montras ke ridinduloj eble estas la personoj kiuj pli kruele ol mokeme faĵfas pri novaj esperantistoj. Unu el tiuj mokantoj antaŭ multaj jaroj admonis min, kiam mi estis eklernanto, ke Esperanto estas nur formiko inter elefantoj, kaj nun multaj jaroj poste komprenis ke li iamaniere pravis. Jes ja, formikoj troveblas ĉiuloke, elefantoj nur en du kontinentoj.

De kie venas tiu lavango da milionoj?

(Kaj nia Esperanto-Movado tiom malriĉa!)

Vi jam scias, ke dum la lastaj tempoj en nia lando oni parolas pri milionoj kvazaŭ ili estus kikeroj. Mi ofte demandas min, el kie venas tiuj milionoj kaj milionoj da pesetoj. Mi ne kapablas respondi tiun demandon, do mia tuja decido estis demandi al mia edzino, ĉu vi scias el kie venas tiu amaso da milionoj, pri kiuj ĵus informis la televido? Mia edzino ne dubas kaj tuj respondas al mi: ŝajnas, ke vi estas iomete freneza aŭ idioto, mi nenion scias, mi jam havas sufiĉan laboron por ke je la fino de la monato restu iomete da mono de niaj mizeraj emerituroj, kaj vi povos aĉeti poŝtmarkojn por skribi al viaj Esperantaj amikoj.

Do, mi restas kiel antaŭe (eble se iu legas ĉi tiun artikolon povos respondi al mi). Jes, el inter ĉiuj dancoj milionaj, mi hodiaŭ celas tiujn milionojn, kiujn oni dediĉos por la fama diĝita televido. Ĉu vi iam atentis pri la astronomiaj ciferoj, kiujn manipulas tiuj sinjoroj? Ofte mi legas kaj relegas tiujn monsumojn, kaj mi miras, ke iuj sinjoroj havas tiom da mono. Poste mi demandas min, nu, kian pekon mi faris en ĉi tiu vivo? Kial mi ne posedas tiujn milionojn kaj milionojn? Poste oni prezentas tiujn sinjorojn aŭ societojn kiel la plej inteligentajn (ankaŭ la plej belajn, agemajn) al kiuj ni devas danki, ĉar ili donos al ni nekalkuleblan eblecon por spekti la plej grandajn stultaĵojn televidajn. Kaj mi, kiu laboris honeste dum 60 jaroj, ĉu mi ne estas inteligenta kaj bela? (Se vi respondas al tiu demando *jes, sinjoro Serrano, vi estis kaj estas malsaĝa, stulta kaj idioto!* fakte vi pravas.)

Verŝajne, ke la torto estas granda kaj bongusta. Certe vi ankaŭ legas tiujn longajn kaj klerigajn artikolojn, kiuj ofte nunatempe aperas en la ĵurnaloj (mi devas konfesi, ke preskaŭ ĉiam mi legas nur la artikoltitolojn) pri la grava evento kiu estos la diĝita televido. Kia negoco, patrino mia! Sendube estos la malkovro de nova oromino moderna. Ankoraŭ oni ne scias, kiel finiĝos ĉi tiu kverelo. Ankoraŭ oni ne scias, kiu prenos la katon!



Poste, mi miras pro tio, ke ili jam kalkulas la negocon

sukcesa. Kie estas la grundo por semi tiujn milionojn? Mi subite malkovras, ke la grundo estas ni, ni mizeraj civitanoj apenaŭ senrajte diri: haltu, haltu vian negocon kaj konsultu nin! Ili jam antaŭvidas nin sufiĉe dresitaj. Ĉu vi iam estis paŝtisto? Mi jes, kaj kiam matene, vole nevole mi devigis la ŝafinojn iri al tiu aŭ alia loko de la kamparo, ili ne protestis. Io simila okazas nun kun la fama diĝita televido. Almenaŭ al mi konsultis neniu pri la temo, sed ili jam kalkulas, kalkulis!! kiom mi devos pagi. La afero estas terura, mia volo, mia sendependeco ne plu ekzistas, aliaj decidas pri mi. Ho ve! kaj feliĉe ke ni vivas en demokratio, kie ĉiu homo rajtas, rajtas, rajtas pri kio...? Jam oni komencas lavadi niajn cerbojn, per promesoj kaj pliaj promesoj. Ili jam kalkulas nin kiel ŝafaron, bone dresitan kaj de kiu ili eltiros kontentigajn profitojn.

Mi ĉiam rilatigas tiun ĉi aŭ kiun ajn alian socian eventon al nia kara Esperanto. Kio okazos poste, kiam tiuj sinjoroj manipulantoj de homaj pensoj troviĝos en la brakseĝoj disdonante ordonojn por atingi, kiel eble plej grandajn profitojn? Ĉu nia kara Esperanto-Movado havos ian signifon por ili? Mi ne scias, sed mi jam antaŭvidas malfacilajn tempojn por ni, esperantistoj. Eble mi eraras, kaj aliaj esperantistoj pli optimismaj ol mi vidas la diĝitan televidon kvazaŭ rozkolora. Nun, kiam ekzistas multaj "televidaj ĉenoj" oni ne atentigas pri ni, kio okazos poste, kiam la tuta televida informado restos en du mano-paroj?

Karaj geamikoj, samideanoj, ne maltrankviliĝu. Kiel diras la francoj, bone aŭ malbone, ĉio solviĝas. Intertempe ne forgesu viajn kursojn, ĉar momente ni nenion plu povas atendi de ĉi tiu socio en kiu ni vivas, kie la milionoj piee premas ĉiujn nin, eĉ se la leĝoj diras male. (Se iam mi malkovros, el kie venas tiuj milionoj kaj milionoj, mi jam avertos vin!)


LUIS SERRANO PÉREZ

(Daŭrigo de la paĝo 39)

pri ĉi tiu projekto Vi povas adresi rekte al la redaktoro de la revuo: José María Rodríguez Hernández, Apartado de Correos 3142 (14080 CÓRDOBA), aŭ pere de la Interreto, vizitante la TTT-paĝon de la nova revuo ĉe

http://www.geocities.com/Acropolis/7009

¤




Ete legeblas **Esbieranto**
Trovita sub bierglaso en Aŭstrio

Sola, kun la ĉielo

Dimanĉa nokto fine de marto. Kion faras mi ĉi tie? Esence kaj ĉefe, esti sola. Cis la maro, en nekonata, tute fremda lando, kie ĉiuj parolas nekonatan kaj malfacilan lingvon. Cis la maro, en stranga urbo kie la vetero estas neatendite humida kaj malvarma. Cis la maro, en malnova domaĉo, kie neniu estas, krom mi.

Tamen, hodiaŭ la tago donacas al mi pecon de mia ĉiama pejzaĝo. Hodiaŭ la ĉielo estas sennuba, kaj ekde la sunsubiro la astroj venas viziti min, cis la maron.

Tion mi perceptis je la komenco de la vespero. Sidinte apud la fenestraĉo, tra ĝi mi vidis la ĉielon malhele blua. Mi ekmemoris pri la dato: la Granda Kometo de 1997 troviĝas plej proksime de la Tero en tiu ĉi semajno. Mi decidis ne mistrafi la oportunon kaj, je la sepa, mi iris surstraten por vidi la ĉielan vostulon. Frunten frapis frosta fred'! Fr! Kiu diris, ke la printempo komencis antaŭhieraŭ? Ĉiel ajn, ĉielen! Mi serĉis lokon kiel eble plej malluman. La kometo fidele alkuris al la renkontiĝo. En Kasiopeo, brile, en alte, tiu malpura bulo el glaco, 40 kilometrojn granda, violente evaporiĝas pro la suna varmo. La kvanto da forjetitaj gasoj estas tiel granda, ke la rezulta vosto vidiĝas de sur la Tero, pli ol 150 milionojn da kilometroj de la kometo. Mi rigardis kaj rigardadis la kosman mirindaĵon. Dume, pasis unu artefarita satelito, kelkaj noktaj aviadiloj kaj plurdeko da aŭtoj. Kiam la komuneco kun la kosmo estis ne nur spirita, sed ankaŭ korpa (mi mem jam estis glaca bulo), mi decidis, ke estus konvene reiri hejmen por trinki ion varman.



Mia fenestro malfermiĝas orienten. Kiam mi residis apud la tablo, la plena luno de marto komencis supreniri el trans la tegmentoj. Sed mi scias, ke la Luno ne venas de tie; ke la Luno venas de trans la maro. Trans la maro, en mia urbo, la Luno estas ĝuste tia, kia mi nun vidas ĝin. Kia familiara vidaĵo en tiel fremda ĉirkaŭaĵo! Pli ol 380 miloj da kilometroj inter la Luno kaj mi, kaj jen ĝi, kun la sama ĉiama vizaĝo. Ve, kompare al tio, mia karulino, en alia kontinento, estas vere tre proksime kaj, tamen, tute ne eblas vidi ŝin...

Ĉi tiu marta plenluno estas la unua post la komenco de la astronomia printempo.

Tial la kristanoj festos venontsemajne la morton de sia dio: feria semajno



en mia lando kaj tamen mi, ĉi tie, morgaŭ, lunde, devos iri labori.
Speciala plenluno, fakte! Ĉar la saĝuloj antaŭdiris, ke ĉi-nokte la plena luno trairos la ombron de la Tero kaj, do, dum kelkaj horoj ĝia disko mallumos. Kaj tio devus okazi dum la Luno pacience supreniras de la horizonto zeniten antaŭ mia fenestro! Nova astronomia spektaklo, sed ĉi-kaze mi povos ĝin ĝui endome, iom pli varme kaj komforte. Jes! Vere! La eklipso jam komencis! Al la luna arĝenta disko mankas mordaĵo! La saĝeco kaj antaŭdir-kapablo de la modernaj astronomoj surprizas eĉ la nuntempajn homojn. Oni diras, kaj eble veras, ke Kristoforo Kolumbo, unu el la unuaj eŭropanoj, kiuj invadis ĉi tiun strangan kontinenton, uzis sian antaŭkonon pri okazonta luneklipso por trompi la indiĝenojn. Ironia monda historio: hodiaŭ la prafiloj de la eŭropaj invadintoj trompas la indiĝenajn eŭropanojn per alispecaj bagatelaĵoj...
Dum la luneklipso progresas, mi rimarkas tiun brilan, oranĝkoloran punkton apud la luna mordata disko. La planedo Marso! Unufoje ĉiun jarduon, Marso alproksimiĝas al la Tero kaj brilas tiel forte kaj ruĝe en la ĉielo. Ho, se mi havus mian etan teleskopon ĉi tie, mi ĝin celumus al Marso kaj mi vidus ties brikokoloran diskon kaj, eble, la polusajn kalotojn... Profitante la proksimecon de Marso, la homoj de ĉi tiu lando ĵetis du robotojn en direkto al tiu planedo. Kelkaj eŭropanoj intencis fari ion similan... sed ĉio fiaskiĝis lastmomente. Se estus tri robotoj, oni povus nomi ilin *Santa Maria, Pinta* kaj *Niña*. Restas nur du; restu, do, la originalaj nomoj: *Pathfinder* kaj *Global Surveyor*. Bonŝancon al la vojaĝantoj, kiuj, kvankam nevideblaj, nun estas tie ekstere, ie inter la planedo kaj mi.
Bela astronomia nokto. Kometo, brila planedo, bela luneklipso... Hm! La fideluloj de la pseŭdoscienco astrologio tute certe faris la plej malbonajn aŭgurojn por hodiaŭ. Minacanta brila kometo en la okcidenta ĉielo, kaj samtempe la Luno eklpsata en proksima konjunkcio kun Marso, planedo de la milito kaj la detruo... Ha! Devus okazi vera katastrofo hodiaŭ!
Sed... ve! Mildiable! Ja jes vera katastrofo okazas! Nekredeble, la astrologoj pravas! Nun mi ekpensas: hodiaŭ estas la lasta dimanĉo de marto. Do, hodiaŭ la oficiala horo en la horloĝoj devas ŝanĝi, unu horon antaŭen! Mi havos unu horon malpli por dormi, kaj morgaŭ mi ne ferias! Kaj rigardante la ĉielon, la tempo pasis flugflue...
Se mi estus trans la maro, en mia amata tero kun la aliaj trompataj indiĝenoj, mia karulino kaj mi observus kune la luneklipson. Poste, ni irus dormi longe kaj varme. Unu horo malpli tute ne gravus, ĉar morgaŭ estus ferio; ĉar morgaŭ estus printempo.

DAVID GALADÍ-ENRÍQUEZ
NEW HAVEN, KONEKTIKUTO, USONO

Esperanto Aplikata

Ĉi tie oni povus legi VIAN anoncon. SENPAGE. Aŭ tiun de viaj amikoj, najbaroj... Simple skribu leteron al ni, kaj via anonceto aperos en nia venonta *Gazeto Andaluzia*.

Kelkaj el niaj anoncoj komencas per io simila al REF-...../... Se vi interesiĝas pri iu el ili, bonvolu skribi al AEU, poŝtkesto 864, 29080 Malago, kaj ni sendos al vi pli precizajn informojn.

❶ Bindadoj FONTIVEROS. En granada kvartalo Zaidín-Vergeles. Manbindado. Ĉiuspeca bindado. Pintor Ismael de la Serna, s/n, Granado, Hispanio.

❷ Internaciaj vojaĝoj tra la tuta mondo. Organizaĵoj kaj vojaĝoficejoj aktivaj en Esperanto-turismo situantaj en pli ol 30 landoj kunlaboras. Kontaktu : ESPERANTOTUR, M. Sklodowskiej-Curie 10, PL-85094 Bydgoszcz, Pollando. Tel : (48-52)415744.

❸ Je dispono de firmao KARAJANI estas sablaj bitumoj (9.3% da pura bitumo) kiuj elteriĝas en Albanio. Rezervoj atingas 13 milionojn da tunoj. Oni uzas la sablan bitumon por surtavoligi straton, por produkti puran bitumon, por fabriki brikojn... Prezo 10 USD (FOB). Kontaktu per telefon/fakso: 3554223972.

❹ Llavisan S.A. fabrikas kranojn kaj ilaron por banĉambroj kaj kuirejoj. Kontaktu sron José Montesinos Marín, direktoro, Camino Azagador s/n, ES-46117 Betera (Valencio, Hispanio). Fakso (6)1601100.

❺ Rapidhogar. Aranĝo kaj muntado de ŝprucfontoj, elektroaparatoj, seruroj kaj hejmaj elektromaŝinoj ; masonado, farbado. Tuttaga servo. Ankaŭ dimanĉe kaj festotage. 2615353. Urĝoj: 902 280 280. Pasaje Juan Cortés 2, Ciudad Nueva Málaga, 29010 Malago, Hispanio.

❻ REF-2398/97. Entrepreno situanta en Valencio (Hispanio) kaj fa-brikanta PVC-ajn akcesoraĵojn por la elĵetado de akvoj, volas kontakti hispanajn kaj eksterlandajn entreprenojn por starigi akordojn cele al la distribuado de siaj produktoj en evoluantaj landoj.

❼ REF-2399/97. Entrepreno situanta en Valencio (Hispanio), ellaboranta kaj importanta kolorigilojn por la industrio de betono. Ĝin interesas kontakti pograndajn entreprenojn de kemiaj produktoj cele al la distribuado de siaj fabrikaĵoj.

❽ REF-2400/97. Hispana konsul-

tejo deziras kontakti konsultiĝajn entreprenojn: financaj servoj, serĉado de distribuantoj kaj/aŭ provizantoj, eksporta/importa komercado, entreprenista kooperado, projektoj de investado, patentorajto kaj aŭtorrajto (interesas ĝin ĉiuj landoj escepte de Hispanio).

❾ REF-2401/97. Entrepreno situanta en Valencio (Hispanio), prizorganta la importadon de paperoj (ĉefe industriaj) higienaj, mansekigaj, buŝaj, tablaj, hejmaj. Ĝin interesas reprezenti por Hispanio kaj Portugalio. Ĝin interesas kontakti fabrikantojn (nur fabrikantojn) el Francio, Italio, Belgio, Irlando, Grekio, Polio, Maroko, Norvegio kaj Britio.

❶❶ REF-2402/97. Brazila entrepreno de sportaj vestaĵoj kaj bikinoj deziras komerci siajn produktojn en Hispanio.

❶❶ REF-2405/97. Brazila entrepreno de verda kafo deziras komerci siajn produktojn en Hispanio.

❶❷ REF-2407/97. Brazila entrepreno de lignoj deziras komerci siajn produktojn en Hispanio.

❶❸ REF-2426/97. Slovaka Vojaĝagentejo deziras starigi kooperajn kontaktojn kun eksterlandaj vojaĝagentejoj. Ĝi pretas servi eksterlandajn klientojn kaj la anojn volantajn kunlabori.

❶❹ REF-2439/97. Greka entrepreno prizorganta importadon/eksportadon kaj reprezentadon de produktoj por farmaciistoj (UTC) kaj kosmetikaĵoj. Ĝin interesas komercaj reciprokaj akordoj en la menciita agado.

❶❺ REF-2449/97. Greka entrepreno volas eksporti virgan olivoleon, makaronion, laktaĵojn, sukeron, sukojn, pneŭmatikojn kaj akcesoraĵojn por aŭtomobiloj. Kvalito: norma, ekstra. Nealtaj prezoj.

❶❻ REF-2507/97. Ĉina entrepreno prizorganta la fabrikadon de sanigaj produktoj volas starigi akordojn de distribuado por sia teo. Ĉi tiu konsistas el

Informe sobre el Esperanto 2. Hispanlingva programo pri Esperanto. Haveblas en 2 versioj: provversio (1 disko), kontraŭ 300 ptoj (poŝtstampoj) aŭ sendante diskon kaj ŝtampitan koverton; versio kompleta (5 diskoj) kontraŭ 3000 ptoj (per antaŭpago) aŭ 3000 ptoj + sendokostoj. Ambaŭ versioj ebligas aŭskulti esperantajn vortojn kaj muzikaĵo(j)n (komprenebleble pli da ili en la versio kompleta). Perfekta por viaj neesperantistaj geamikoj. J. F. Martín del Pozo, Poŝtkesto 5184, 29080 Malago, Hispanio.

sukero kristaligita, ĉina licio, semoj de lotuso, kerno de aprikoto, ktp. Ĝi malpliigas la soifon, stimulas la sekrecion de salivo, refreŝigas la spiraĵon, ktp.

❶❼ REF-2527/97. Itala fabrikanto de ĉarniroj por mebloj, ĉefe kuirejaj mebloj. Ĝi volas starigi akordojn por distribuado kaj provizumo de produktoj.

❶❽ REF-2528/97. Belga entrepreno prizorganta la organizadon de la distribuado (eldono, pakado, ktp.) serĉas entreprenon kiu jam havas kontaktojn kun Belgio kaj Benelukso kaj volas pliigi siajn negocojn helpe de loka entrepreno.

❶❾ REF-2565/97. Itala entrepreno kiu laboras per italaj produktoj ekde 1969. Ĝi volas kunlabori kun entreprenoj serĉantaj italajn produktojn, jen kiel reprezentantoj, jen kiel entreprena oficejo.

❷❶ REF-2573/97. Franca entrepreno tre sperta pri materialoj por la industrio: elektra izolado, termika izolado, elektraj kondukado kaj nutrado, kablado, ktp. Klientaro: grandaj industriaj entreprenoj, pleje situantaj en la sudo de Francio (aeronaŭtiko, elektraj aparatoj kaj elektraj hejmmaŝinoj, metalurgio...) Nuna negoca kvanto: pli ol 17 milionoj da francaj frankoj. Ĝi serĉas komercan kaj financan kompanianon, fizikan personon aŭ socieron kun travivaĵoj en la sektoro, cele al disvolvo de la nuna strukturo, eble en alia eŭropa lando.

❷❶ Rondvojaĝoj kaj restadoj en Hungario. En hoteloj kaj pli modestaj tranoktejoj. Restadoj en Hispanio. 25-jara profesia sperto en Internacia Esperanto-Turismo. Vojaĝagentejo MOVILO, Soroksári ut. 117/D, 1095 Budapeŝto, Hungario. Tel: (36-1)178-27-93 ; fakso: (36-1)418-2840.

❷❷ Salou (Taragono, Hispanio). Je cent metroj de la marbordo, mi havas lueblan apartamenton por maksimume 6 personoj. Nur somere. Turnu vin al s-ino Luz Vázquez (977)855253.

❷❸ Sperto pri aŭtorrajtoj, sportaj aparatoj, sukeraĵoj, merkatado de videokasedoj, akcioj de siberiaj naftaj kompanioj kaj de konzerno *Norilska Nikelo*, reprezentado en Krasnojarka regiono. Inĝ. Evgenij Tenjakov, posto 8, abono 4, 662800 Minusinsko, Ruslando.

❷❹ Por la importo al la ĉeĥa merkato, mi serĉas sekvajn produktojn: globaj kranoj, retroklapoj, fermigaj klapoj sen flanĝoj kaj finaj gorĝaj klapoj. Postulataj diametroj estas almenaŭ 40 cm. kaj pli grandaj. Se vi havas intereson pri pero aŭ livero, mi petas pri tio pli detalan informon. Jiri Caletka (Reprezentanto de firmao Ekosolaris), Na nábrezí 11, CZ-746 01 Opava, Ĉeĥa Respubliko. Tel. +42 653 218601; fakso +42 653 211748.

Financa raporto de AEU (je la 31a decembro, 1996)

Enspezoj		
Favora saldo je 31dec95		*406407*
Ordinaraj Kotizoj	122201	
Poŝtmarkoj	937	
Instruado	65352	
Rentumoj	247	
Loterio	157200	
Jarenspezoj		*345937*
Entute		*752344*
Elspezoj		
Poŝto	30608	
Kotizoj	5400	
Interreto	400	
Perbanke rifuzitaj kvitancoj	5500	
Papervendejo	22577	
Fotokopioj	49235	
Ŝparkaso	3719	
Loterio	130080	
Revuoj	8880	
Jarelspezoj		*256449*
Saldo favora		*495895*

(...)
Silaba vortenigmo 30
Melilo: 500 jaroj de Historio 32
Memore al bona amiko 34
Formikoj kaj elefantoj 35
Kiamaniere komenciĝis la dua epoko de *Gazeto Andaluzia* 36
Intima kunvivulo 38
Jura Tribuno Internacia, nova revuo eldonota en Andaluzio 39
Radioamatora angulo 40
Fonduso Germain Pirlot 41
De kie venas tiu lavango da milionoj? 43
Sola, kun la ĉielo 45
Esperanto Aplikata 47
Financa Raporto de AEU, je la 31dec 96 50

Jam pasis 49 numeroj de kiam ekaperis *Gazeto Andaluzia* en sia dua epoko. Tial, kiel jam konite de niaj legantoj, ĉi tiu speciala numero: 48 enaj paĝoj anstataŭ 28; egaj vortenigmoj kun speciala premio (vid. paĝon 25 kaj sekvantajn). Vi ankaŭ trovos la premiitan verkon de nia konkurso *50 numeroj de Gazeto Andaluzia*.
Krome, ni profitis la okazon por peti specialajn kunlaboraĵojn de homoj kiuj delonge ne aperis sur niaj paĝoj: legu ekzemple la artikolojn de Rikardo FAR kaj David Galadí, kiuj (espereble) baldaŭ reoferos sian vervon al niaj legantoj. Kaj ankaŭ aperas homoj neniam antaŭe legitaj ĉi tie, kiel nia antipodano d-ro D. Broadribb.
Krom tio, vi trovos la jam kutimajn sekciojn kaj ankaŭ novan, kie samideanoj de Melilo kunlaboros el tiu proksima, alikontinenta hispana urbo.
Ni esperas ke vi ĝuos la legadon. Kaj vi esperas, ke vi ŝatos nian revuon tiom, ke ni atingos (... minimume!) la 100an. ¤

F U N D A M E N T O D E E S P E R A N T O

La "Fundamento de Esperanto" tute ne devas esti rigardata kiel la plej bona lernolibro kaj vortaro de Esperanto. Ho, ne! Kiu volas perfektiĝi en Esperanto, al tiu mi rekomendas la diversajn lernolibrojn kaj vortarojn, multe pli bonajn kaj pli vastajn, kiuj estas eldonitaj de niaj plej kompetentaj amikoj por ĉiu nacio aparte kaj el kiuj la plej gravaj estas eldonitaj tre bone kaj zorgeme, sub mia persona kontrolo kaj kunhelpo. Sed la "Fundamento de Esperanto" devas troviĝi en la mano de ĉiu bona esperantisto kiel konstanta gvida dokumento, por ke li bone ellernu kaj per ofta enrigardado konstante memorigadu al si, kio en nia lingvo estas oficiala kaj netuŝebla, por ke li povu ĉiam bone distingi la vortojn kaj regulojn oficialajn, kiuj devas troviĝi en ĉiuj lernoverkoj de Esperanto, de la vortoj kaj reguloj rekomendataj private, kiuj eble ne al ĉiuj esperantistoj estas konataj aŭ eble ne de ĉiuj estas aprobataj. La "Fundamento de Esperanto" devas troviĝi en la manoj de ĉiu esperantisto kiel konstanta kontrolilo, kiu gardos lin de deflankiĝado de la vojo de unueco.

Mi diris, ke la fundamento de nia lingvo devas esti absolute netuŝebla, se eĉ ŝajnus al ni, ke tiu aŭ alia punkto estas sendube erara. Tio ĉi povus naski la penson, ke nia lingvo restos ĉiam rigida kaj neniam disvolviĝos... Ho, ne! Malgraŭ la severa netuŝebleco de la fundamento, nia lingvo havos la plenan eblon ne sole konstante riĉiĝadi, sed eĉ konstante pliboniĝadi kaj perfektiĝadi; la netuŝebleco de la fundamento nur garantios al ni konstante, ke tiu perfektiĝado fariĝados ne per arbitra, interbatala kaj ruiniga rompado kaj ŝanĝado, ne per nuligado aŭ sentaŭgigado de nia ĝisnuna literaturo, sed per vojo natura, senkonfuza kaj sendanĝera. Pli detale mi parolos pri tio ĉi nur kelkajn vortojn, por ke mia opinio ne ŝajnu tro paradoksa:

1) Riĉigadi la lingvon per novaj vortoj oni povas jam nun, per konsiliĝado kun tiuj personoj, kiuj estas rigardataj kiel la plej aŭtoritataj en nia lingvo, kaj zorgante pri tio, ke ĉiuj uzu tiujn vortojn nur en la sama formo; sed tiuj ĉi vortoj devas esti nur rekomendataj, ne altrudataj; oni devas ilin uzadi nur en literaturo; sed en korespondado kun personoj nekonataj estas bone ĉiam pene uzadi nur vortojn el la "Fundamento" ĉar nur pri tiaj vortoj ni povas esti certaj, ke nia adresato ilin nepre trovos en sia vortaro. (...)

2) Se la aŭtoritata centra institucio trovos, ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo en nia lingvo estas tro neoportuna, ĝi ne devas forigi aŭ ŝanĝi la diritan formon, sed ĝi povos proponi formon novan, kiun ĝi rekomendos uzadi paralele kun la formo malnova. Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, kiu fariĝos arhaismo, kiel ni tion vidas en ĉiu natura lingvo.

(El "Fundamento de Esperanto" de L. L. Zamenhof)